


LEGAĴOJ XVII.

POR TIUJ, KIUJ ANKORŬ LEGAS



drahotova@esperanto.cz

Presite en Ĉistá ĉe Mladá Boleslav 2026

La juneco estas la plej bela periodo de homa vivo. Domage, ke oni devas maljuniĝi por scii pri tio.

Mateno, kiu komenciĝas kun papiliono

El eta ovo malpli ol milimetro diametra, eta nigra larvo eloviĝas, ŝanĝiĝas en verdan larvon, ŝanĝiĝas en krizalidon, kaj el la krizalido 3 centimetrojn longa, naskiĝas bela papiliono. En la eta krizalido, kaŝitaj grandaj flugiloj, eĉ kun granda ventro. Kaj ĝi sekigas kaj fortigas la flugilojn,

Daŭras ĉirkaŭ du semajnoj, por ke la ovo fariĝu papilio. Dum ĉi tiu tempo, ĝi manĝas nur 10 mandarinajn foliojn. Ĉu en ili estas "nutraĵo", kiu kaŭzas tian transformon? De krizalido ĝis papilio ĝi simple atendas sen manĝado.

Ĉu tempo estas nutraĵo por matureco? Tio estas vere mistera.

Matene, en mia ĉambro mi trovas papilionon fluganta. - Venu sur mian manon ! Kaj ĝi venas al mia fingro, kaj fermas kaj malfermas flugilojn. -Mi faros foton, mi diras. Mi fotas ĝin proksime. Kio aperas en la fotoj, tio estas alia mistera mondo. Nigraj okuloj, spirala buŝo, ses maldikaj kruroj. Ornamas la silkaŝimilaj flugiloj ĉielon. Delikataj koloroj. -Ĉu vi estas preta ekvojaĝi? Ĝi signalas per svingoj de la flugiloj, Jen! -Vi

forflugu en la vastan mondon!
Mi milde igas la papilionon flugi en la ĉielon. -Al la blua ĉielo, flugu !

Mia nova, esperplena mateno komenciĝas, kun la novnaskita papilio.



2025 年 9 月 1 6 日 La 16an de septembro 2025, Hori Jasuo.

Slower, Older and Smarter (pli malrapida, pli maljuna kaj pli saĝa)

Airbuso 380 flugas trans Atlantiko per stabila rapideco 800 km/hore en alteco 30 000 futoj. Subite aperas apude ĉasaviadilo Eurofighter. Piloto de ĉasavio malrapidigis kaj salutis per radio piloton de transporta aviadilo: „Kamarado, enua laboro, ĉu? Jen rigardu!“ kaj tuj turnas sian ĉasavion enfrenezaj figuroj, tuj altiĝas, tuj malaltiĝas ĝis surfaco de maro. Kaj revenante al Airbuso, demandas: „Ĉu vi vidis? Ĉu??“


La piloto de airbuso respondas: „Tre impona! Kaj nun rigardu vi!“

Stiristo de ĉasaviadilo rigardas airbuson, sed nenio okazas. Airbuso flugas per konstanta rapideco. Post la kvaronhoro demandas radie stiristo de ĉasaviadilo: „Kion vi faris?“

„Mi stariĝis por mallacigi krurojn, iom promenis al tualeton, preparis kafon, formanĝis deserton ...“

Jen instruo: Se vi estas junaj, ŝajnas al vi rapideco, adrenalino brilaj, sed dum venanta senioreco venas saĝeco kaj vi aprezas trankvilon kaj komforton kaj vi trovas ilin pli gravajn.

Kio estas DIELLA



Ĝi estas AI sistemo fondita sur teknologioj OpenAI kaj Microsoft Azure. Origine ĝi funkciis kiel virtuala helpantino „eAlbania“ por civitanoj dum administraj aktoj. Nun ĝi rolas kiel ministro por analizo de datumoj dum publikaj mendoj. Ĝi serĉas dubindajn traktojn kaj atentigas homajn oficejojn pri eblaj misproporcioj. Oni konstruis ĝin neinfluitantan – ĝi nek havas amikojn, nek interesojn, nek eblon esti koruptita (subaĉetita).

Laŭ premiero Edi Rama tiu ĉi paŝo estas strebo de Albanio enveni EUn ĝis la jaro 2030, kie estas senkorupto la ĉefa kondiĉo. Diella servus helpi altigi fidon al ŝtata regado. La projekton observas internaciaj organizoj kiel **Transparency International**, ĉar Diella povas esti precedento.

Ankaŭ aliaj landoj jam uzis AI por administrado. Ekzemple Estonio enmetis AI en sian tribunalan sistemon, por solvi etajn kaŭzojn.

Laŭ artikolo de Karel Směly el bbc.com, news.sky.com koncizigis kaj tradukis JoDo.

BARBORA SMETANOVÁ

patrino de Bedřich Smetana - fama muzikkomponisto
(1884-1924)

Barbora naskiĝis je 20-a de novembro 1791 en Miletín, kiel filino de nobela skribisto Lynek. Ŝi en aĝo 29 jaroj edziniĝis al bierfaristo František Smetana – 43 aĝa dufoja vidvo, kiu serĉis patrinon por siaj infanoj. Geedzoj loĝis en bierfarejo en Litomišlo kaj tie naskiĝis je la 2-a marto filo Bedřich – la dekunua infano de František. Entute prosperita familio havis 18 infanojn.

SinJORINO Barbora estis kompakta virino. Ŝi fondis rondon de legantoj, interesis pri teatro, en familio oni muzikis. Kvarjara Bedřich ricevis violoneton. SinJORINO Barbora estis virino estimata, trankvila kaj senbrua. Ŝi zorgis kun amo pri kvin nepropraj filinoj kaj pri dek propraj siaj infanoj. La familio estis granda. En ĝi vivis ankoraŭ gepatroj de Barbora, fratino de ŝia edzo kun kvin infanoj kaj frato de edzo. Barbora gvidis familion kaj prezentis nivelon de bonstata tavolo. František Smetana posedis kasteleton Lhotice, farmon, bierfarejon kaj gastejon. Tamen dum siaj lastaj du jaroj antaŭ sia forpaso (1857) li ĉion perdis kaj la familio malriĉiĝis. Barbora ekloĝis ĉe sia filino en Mladá Boleslav, kie ŝi malsaniĝis kaj je la 20-a novembro 1864 forpasis 73jara. Ŝia tombo estas en urba parko *Havelský*, eksa tombejo.

Laŭ Anna Šímová,
el Senior Revuo 4/2025, Mladá Boleslav.
tradukis JoDo.

Kanto de malespera serĉanto

Kien mi tion metis?
Kie ĝi povas esti?
Kien mi tion kaŝis
en mia malgranda
apartament'?

Jen, mi trovis multajn aĵojn,
kiujn mi serĉis antaŭ jar',
sed tion, kion mi nun vane
serĉas,
nur dio min helpi povas.

Ĉu ĝi estas super ŝranko?
Eble en tirkestoj?
Ĉu en tiu granda potoj?
Ĉu ĝi pendas en kurtenoj?

Kien mi tion metis?
Kie ĝi povas esti?
Kien mi tion kaŝis
en mia eta apartament',

Tradukis JoDo.

La plej gravaj ne estas aĵoj, sed momentoj.

Humoro estas la plej honora maniero esprimi
malĝojon !!!!!



Ĉu nova identeco por nia asocio?

Bill Maxey (Usono) Ateo, 2025

En aprilo mi profitis la ŝancon ĉeesti prezentaĵon de Peter Marty, eminenta luterana pastoro kaj ĉefredaktoro de la usona revuo *The Christian Century* (La Kristana Jarcento). Fondita en la jaro 1900, la periodaĵo, laŭ sia propra priskribo, estas pensiga, sendependa kaj progresema, “gvida voĉo, helpante legantojn fari sencon de kredo, kulturo kaj politiko en nia tempo”. Ni ĉeestantoj ricevis donace la plej freŝan aprilan numeron.

Mi scivoleme legis nur kelkajn artikolojn sed atente trafolumis la tuton. Mi baldaŭ rimarkis, ke preskaŭ ĉiuj el la artikoloj, tre multspecaj, iel baziĝis sur la kristana Biblio. Malgraŭ la granda diverseco de la temoj kaj stiloj – inkluzive de historioj, raportoj, lecionoj, opiniaj eseoj, recenzoj k.a. – la frapa konstato estis, ke la plimulto da kontribuintoj ĉerpis el tiu komuna fonto. Certe ankaŭ kleraj budhanoj fundamentas siajn eseojn kaj artikolojn pri ajna temo ĉefe sur la sutroj de la Budho, la judoj sur la Talmudo kaj ties komentarioj, kaj la islamanoj sur la Korano. Sendube aliaj religioj montras la saman tendencon. En ĉiu kazo do oni disponas komunan, konatan bazon por tiuj, kiuj volas komenti aŭ kontesti iujn ideojn aŭ proponi alternativajn interpretaĵojn pli konvenajn al la nuntempaj kulturaj kaj sociaj cirkonstancoj.

Tia fonto tamen klare mankas al ni ateistoj. Ni ne havas eĉ unu fundamentan tekston – kaj certe ne kanonon – kiu stimulus nian pensemon kaj al kiu ĉiuj legantoj povus rilati.

Tre kredeble tiu manko malhelpas nian seriozan kaj komunan traktadon de sociaj aferoj.

Montriĝas ke nia pensokampo (almenaŭ en ATEO) konsistas ĉefe en novaĵoj pri atencoj al religia libereco (ĉefe en Usono), statistikoj pri ŝanĝoj en religio, esplorado de la historio de ateismo kaj konataj ateistoj, la ĝena aroganteco de religiuloj kaj argumentoj kontraŭ la ekzisto de ia dio. Laŭ mi, tiuj temoj, kvankam certe interesaj, nek profundas nek fekundas kaj apenaŭ stimulas. Ili almenaŭ ne instigas niajn membrojn reagi.

Tiuj faktoj ŝajnis al mi, ke ATEO ne povos prosperi sen fundamenta ŝanĝo. Ni bezonas trakti aferojn pli gravajn, kiuj prezentas ideojn provokajn kaj vere pensigajn, kiuj elvokos reagojn kaj meritas interpretadon laŭ senreligia vidpunkto.

Mi ne scias ĉu ĉiuj ateistoj nomus sin “humanistoj” aŭ ne, sed preskaŭ certe ĉiuj *esperantistaj* ateistoj ja akceptus tiun etiketon. (Temas kompreneble pri “moderna humanismo” kaj ne la renesanca speco difinita en PIV.) Ĉar ni ne agnoskas ian dion kaj okupiĝas pri sociaj aferoj, nepras nuanci ĝin per “sekulara”. Ni do povus identiĝi samtempe kiel ateistoj kaj sekularaj humanistoj.

Tiu nova identeco ebligus al ni facile religi nin kun niaj radikoj kiel esperantistoj, kun la tradiciaj ideoj kaj zorgoj de nia komunumo. La ideoj de d-ro Zamenhof rilate la internan ideon kaj homaranismon. **La kompato por la homoj ambaŭflanke dum militoj kaj la deziro por paco.** La temoj de la multaj literaturaĵoj kiuj reliefigas la efikojn de militado, subpremaj reĝimoj, homa krueleco kaj homa mizero,

diskriminacio, konsumismo kaj multaj aliaj malbonaĵoj, sed ankaŭ la heroaĵojn kaj ofte sinoferajn agojn de tiuj, kiuj rezistis la premojn. Ne surprize, preskaŭ ĉiuj tiuj temoj denove montras sin tre aktualaj en nia mondo, sed ricevas malmultan atenton en esperantistaj rondoj.

Ĉu ni pripensu tiun ĉi defion? Jen nur du el multaj ideoj konsiderindaj:

- Ni povus kunlabori por renovigi la zamenhofan *Deklaracion pri homaranismo*, retenante la plej bazajn principojn sed forĵetante aliajn por pli taŭgigi ĝin por la nuna mondo. Ĝi povus roli kiel fundamenta teksto por modernaj esperantistoj.
- Ni povus krei komentarion surbaze de *La infana raso*, unuaranga sendia verko, kiu traktas multajn gravajn temojn. Ĝi emfazas jam en sia unua ĉapitro, ĉu ne, tion ke ĉiuj homoj ja estas gefratoj, ne ĉar ili estas “infanoj de Dio” sed ĉar sciencaj esploroj (aŭ almenaŭ matematiko!) pruvas tion. Sendube multaj nuntempaj esperantistoj ankoraŭ ne konas la verkon, kaj niaj klopodoj povus ripari tiun mankon.

Laŭ mia konstato la novaj generacioj de esperantistoj scias ĉiam malpli multe pri la fundamentaj ideoj de esperantismo. Denove akvumi la radikojn ŝajnas al mi inda projekto.

Kvankam ne necesas trakti la temon ĝuste nun, laŭ mia supozo ŝanĝi la nomon de la asocio helpus allogi pli da homoj kaj vigligi la diskutadon. Certe ni konsideras nin liberpensuloj

kaj tre versajne ankaŭ sekularaj humanistoj. Nova nomo nepre aludu tiujn ideojn. Eble survoje ni demandu al Ralph Dumain kial li elektis *Ateista* anstataŭ vorto kun senco pli ampleksa. Necesas respekti nian propran historion, eĉ dum tempo de (eventualaj) ŝanĝoj.



Ni memoru, ke Esperanto gravas, ĉar ĝi unike inter lingvoj povas krei kondiĉojn kiuj permesas renkontiĝi „*ne angloj kun francoj, ne rusoj kun poloj, (nek usonanoj kun kanadanoj) sed homoj kun homoj*”, kaj tio estas granda parto de nia kialaro por prezenti ĝin al la mondo.

Mi esperas, ke baldaŭ ni alvenos al situacio, en kiu la celo ligi homojn kun homoj ne plu estos konsiderata politika.

Brandon Sowers, prezidanto de E-USA
sendis Turkadze

Planto, kiu voras nikelon

Rinorea niccolifera estas latina nomo de arbusto, kiun oni trovis sur insulo Luzon en Filipinoj en la jaro 2014. Ĝi kapablas akumuli altan kvanton de nikelo (ĝis 18%) kiu estas toksa, danĝera por aliaj organismoj. Sciencistoj esploras ĝian uzadon per fitoremediacio kaj promesas plimalmultekostajn solvojn de polucio de tero ol klasikaj sanacioj. La plantoj povus dum kelkaj jaroj la danĝerajn metalojn el grundo elsuĉi. Jam ekzistas provoj la nikelon el la plantoj akiri.

La planto kun specifaj ecoj kreskas malrapide.

17. 6. 2014, inhabitat.com

Tradukis JoDo.

Tilia kafo



Tilio estas simbolo de paco kaj kvieteco. Ĝi estas arbo por ĉeĥa nacio grava. Folioj de ĝi apartenas sur nia blazono kaj sur standardo de prezidento. Popolaj kantoj, fabeloj kaj rakontoj pri ĝi historie sciigas. Ĝiaj floroj donas nutron por abeloj, teo el floroj kuracas bronkojn, pulmojn, renojn, mildigas maldormon, malaltigas febron, agrable aromas. Ĝia ligno taŭgas por skulptistoj. Ne estas facile tilion kulturi, ĝi mem nur malofte reproduktas sin.

Sed pri tio, ke niaj antaŭuloj trinkis tilian „kafon“ mi ne sciis. Mi trovis la recepton en gazeto Květy (Floroj) 22/2025, p. 36. Se vi interesas, legu, eĉ provu.

Recepto: La fruktojn de tilio forigu de brakteoj kaj pedunkloj kaj sekigu je 180 gradoj 20 minutoj, ĝis fruktoj estas orkoloraj. Poste la fruktojn oni muelas. Por prepari „kafon“ oni uzas du kuleretojn de la muelaĵo kaj 200 ml de bolita akvo oni verŝas en poton.

Nun oni povas trinki antikvan slavan kafon.

JoDo.

SENECIO



Senecio inaequidens (Starček úzkolistý) estas planto fremda en nia naturo. Ĝi penetris al Eŭropo el Afriko kune kun ŝafa lano. Ĝi aperis en Germanio en fino de la naŭaj jardekoj de dudeka jarcento. Ĝi rapide danĝere disvastiĝas laŭ vojoj kaj fervojaj reloj kaj endanĝerigas negative plantojn, eĉ sanon de bestoj eĉ homoj – diras plantologoj.

En Ĉeĥa respubliko senecio aperis en jaro 1997 kaj tuj ĝi komencis penetradon en naturajn biotopojn. Ĉeĥa plantologia organizo volas atentigi pri problemoj de la influo de fremda senecio kaj pluraj invademaj plantoj publikon kaj senecion nomigis „planto de la jaro 2025“, ĉar ĝi estas toksa. Dum disvastiĝo en paŝtejoj ĝi kapablas ĉe bestoj kaŭzi ĥronikajn malsanojn inklusive de anoreksio kaj lakso, dum pli longa konsumado bestoj kadavriĝas. La planto rezistas ĉiujn herbicidojn, ĝi produktas multe da semoj kaj vivas kelkajn jarojn.

JoDo.

Kristnasko de bestoj

Tiu ĉi fabelo estas tre antikva. Ĝi okazis en tempoj, kiam bestoj ankoraŭ parolis latine, speciale laŭ propraj kapabloj.

Koko: „KikerikiKrstusnatusest!“

Anseroj: „Quaquando?“

Korvoj: „Haknokttehachak!“

Bovinoj: „UUUUbi.“

Ŝafoj: „Beetlehem.“

Azeno decide: „Eamus!“

Kaj ili iris ĝis venis en betlehemman stalon. Cikonio tre zorgeme per siaj plumoj preparis molan kaj luksan lulilon por Infano. Kaj de tiu tempo cikonioj zorgas pri infanoj. Ruĝgorĝulo bruligis fajreton kaj tutan nokton pri ĝi gardis. Ĝia brusto ruĝiĝis per flamoj kaj tiel eĉ restis. Najtingalo kreis sian neston apude Krista kripo. Ĝi ĝis nun ne sciis kanti, sed anĝela ĥoro instruis ĝin kaj ni povas aŭskulti nun eĉon de anĝelaj melodiojn. Aperis Virkato. Spite ĝi ne deziris kun aliaj genuiĝi, nur pace konsente murmuris. Ĝia sendependeco plaĉis al Maria kaj ŝi benis ĝin kaj diris, ke ĝi venonte estos amiko de homo, sed neniam ĝi sklaviĝos. Kaj tiel plu kaj plu, kun bestoj.

Kaj ĉefaj donacoj de Kristnasko estas „rompo de tempo“, kvieto, paŭzo por trankvileco kaj silento en malpacaj tagoj, kiuj similas unu al la aliaj, ĉiam samaj kaj ĉagrenaj. Kristnasko, kiun homoj denove povus malkovri, tio kio estas

la plej bona en ilia ekzisto, estas renkonto de mistero inter ĉielo kaj tero.

Sed eĉ bestetoj eksciis, ke por homoj estas malfacile senti la ĝustan sencon de la Kristnasko kaj homoj solenas ĝin per multaj strangaĵoj, nesciante kial.

Pro tio bestetoj aranĝis kongreseton.

Vulpo demandis Sciuron: „Kion signifas por vi Kristnasko?“

La Sciuro respondis: „Por mi tio estas bela, rekte staranta arbeto kun multaj lumetoj kaj doĉaĵoj por krakete manĝi, pendantaj de branĉoj.“

La Vulpo daŭrigis: „Por mi, kompreneble tio estas grasa, bakita, aroma ansera bakaĵo. Se ne estas bakaĵo, ne estas Kristnasko.

Urso enmiksiĝis: „Por mi odoranta dolĉa mielo!“

Pigo ekkriis: „Mi opinis, ke tio estas brilantaj juveloj kaj ornamaĵoj. Kristnasko estas nur lumradiaj objektoj.“

Eĉ Taŭruko aldonis: „Kristnaskon faras ĉampano! Mi dezirus kelkajn botelojn.“

Nur Azeno rezolute diris: „Taŭruko, ĉu vi freneziĝis? Dum Kristnasko la plej grava estas Jesu Infano! Vi ĉiuj malmemoris!“

La Taŭruko honteme klinis sian grandan kapon kaj diris: „Sed ĉu homoj tion scias?“

Nu, kiel ĉiam azeno kaj taŭruko sincere pravas.

*El la libreto de Bruno Ferrero „Zastavení pro duši“
(Haltiĝo por animo), eldonis 2024 Editrice ELLEDICI,
Torino.*

*El la itala originalo tradukis al la ĉeĥa Apolinarie
Rubešová 2025, eldonis Portál s.r.o. Praha.*

*En novembro 2025 tradukis el ĉeĥa lingvo al Esperanto
Jindřiška Drahotová.*

Aŭtuno

Sub la griza vualo de pluvo
la mondo silente spiradas
la folioj preĝas sur tero
kaj ĉiu guto falas kiel penso,
revenanta al la fonto de la animo.

Kaj mi perдите en la murmurado
aŭskultas la tempon disvolviĝi.
En spegulo de malsekaj vitroj
mi vidas ne la mondon,
sed min mem – malnova sonĝo velkiĝanta.

Stanislavo en Fb.

Antaŭ celo de ĉiu homo

J. Drahotová 2025

Ĉie aŭdeblas en ĉeĥa lando informoj pri mono por armigo, neceso prepari ĉion por defendo, altigi ŝtatan elspezon ĝis 5% pro tio, instigi junularon plibonigi korpan taŭgecon, altigi salajron de soldatoj, timigi malamikon, fabriki armilojn, dronojn, eduki kibernetikon ktp, ktp.

Tiuj ĉi informoj naskis al mi miajn infanajn rememoraĵojn pri Dua mondmilito, kiun mi travivadis en urbo Mladá Boleslav proksime 50 kilometroj de ĉefurbo Prago. Mia patrino naskiĝis en jaro 1913, kiam komencis la Unua mondmilito. Ŝi travivis ambaŭ militojn, vivis malfacilan vivon. Mi naskiĝis 1938, kiam komenciĝis la dua mondmilito. Nun en la jaro 2025 vivas jam tre malmulte el miaj samaĝuloj, sed ni ankoraŭ estas ĉi tie kaj kunvenas en grupetoj, kiuj rapide ŝrumpas.

Mi volas konfesi al vi pri miaj infanaj memoroj, pri okazaĵoj, kiujn min influis por ĉiam kaj nun denove viviĝis en mia kapo..

Mia patrino forpasis antaŭ dek kvin jaroj. Ŝi vivis longan vivon – 96 jarojn. Mi estis ŝia ununura filino. Mia patro forpasis en la jaro 1955. Dum ŝiaj lastaj dudek jaroj mi kun ŝi vivis kune solaj kaj ofte babilis pri vivo. Iam ŝi diris al mi: „La unua milito estis pli kruela ol la dua.“

Pri mia infaneco mi pensas, ke ĝi estis feliĉa. Jen miaj rememoraĵoj:

Mi kuŝas en infana liteto kaj rigardas plafonon grizan kun sulkoj. Poste mi penegas sidiĝi kaj stariĝi helpe de liteta neto

per buŝo kaj per manoj, ĝis mi akiris metalan stangon. Mi, unue staranta, sentis grandan venkon.

Mi sidas sur genuoj de patrino kaj ŝi legas al mi el infana libro kun ekzotikaj bestoj en versoj. La bestoj estas verece desegnitaj, kiel vivaj. Alian libron mi ne havis. Baldaŭ mi ekkomprenis, ke sub bildoj estas literoj kaj tiujn literojn oni legas. Mi trovis tion rava.

Estis nokto. Mi kuŝis sur tablo. Gepatroj serioze parolis kun kuracisto. Unuan fojon oni veturigis min aŭte. Al hospitalo. Mi suferis per tuso. Vico de infanlitetoj. Kuracisto kaj monaĥino en blanka uniformo kverelis. Mi ne ploris. Mi atendis, ĉar panjo diris, ke ŝi venos. Iam mi vidis panjon tra fenestro, ŝi montris al mi kajeron kaj tre mallongajn farbokrajonojn, ankaŭ glaseton da kompoto. Poste donis al mi la aĵojn civila flegistino. La memoraĵoj el hospitalo estas tre klaraj eĉ post pli ol okdek jaroj, pri tusantaj suferantaj knaboj, kiuj nokte silentiĝis kaj matene liaj litetoj estis blanke puraj, vakaj.

Estis bela suna tago. Mi kaj patrino sidis sur benko en parko. Armea muziko koncertis. Venis oficiro, salutis, alparolis patrinon kaj min, li sidiĝis sur benkon kaj ili komencis babili. Mi ne komprenis. La oficiro donis al mi ĉokoladon.

Mi sidis sur planko kaj ludis per lignaj nesimetriaĵoj. Patro alportis ilin el laborejo (ŠKODA) li segis ilin el malmola ligna matrico por fabriki karoserioj. Sed miaj ludiloj prefere servis por hejtado.

Frua mateno. Vekis min malagrablaj sonoj. Patro purigis funnigron el malgranda hejtilo. Miaj oreloj turmentis, kapo ekdoloris. Mi ŝtopis orelojn.

Mia avino spite ŝi vivis en la sama vilaĝa lignodomo, nun loĝis en alia lando - Grandgermana imperio proksime 20 km. Gepatroj akiris permeson vizitadi ŝin. Paĉjo veturigis min tien sidantan antaŭ li sur biciklo. Mi estis 3-4 jara. Ĉe limo severe nin kontrolis oficistoj. Ili serĉis manĝon, kiam ni reveturis el vilaĝo. Mi timis, kriis.

Estis mallumo, aŭdiĝis bombado. Mi kuŝis en lada malvarma kuveto en kelo, Aliaj homoj kuŝis tie en ujoj por lavi tolaĵoj. Miaj fingroj sur kruroj frostis. Eĉ nun post 80 jaroj vekas min nokte koŝmaro de tiuj malvarmegaj kruroj.

Mi ankoraŭ ne estis sesjara, sed mi komencis viziti lernejon dum milito. Tie ni ricevis grizajn paperojn kaj ni skribis kaj desegnis sur ilin per blankaj kraĵonoj. Instruistino kriis al ni RUHE!! en mano ŝi havis longan timigan montrilon, ŝi parolis nur germane,

Tio estis miaj rememoraĵoj pri milito.

Venis printempo 1945. Bela, agrabla veteto. Disfloris siringoj. Sur placeto en nia „kolonio“ (domoj por laboristoj en loka fabriko, kiu fabrikis por germanoj), kie ni loĝis, aperis sovetaj junaj, malpuraj, gajaj soldatoj kun ĉevaloj kaj ĉevalveturiloj. Homoj freneze ilin brakumis, invitadis hejmen, gastigis ilin, ĝojis ... Milito finiĝis. Subite aperis aviadiloj, nekutime malalte flugis kaj falis bombojn. Sur ili estis germanaj markoj. Teruro en okuloj de apudaj homoj estis enorma. Mi unuan fojon vidis, ke maturaj homoj timegas.

Alian tagon mi vidis transporton de vunditaj soldatoj, eble iuj jam ne vivis. Kaj sanga rememoro ensegiĝis en mian cerbon porĉiam – multaj homoj kun floroj kaj flagetoj staris rande de strato kaj ĝoje salutis konvojon de tankoj. Sur tankoj sidis soldatoj, Ĝenerale regis gajo. Subite juna soldato malfeliĉe falis sub ĉenbendon de tanko proksime de mi, la sango dispruĉis, homoj eksvarmis, patrino min forĝvidis ... La soldatoj baldaŭ foriris. Restis al mi infana braceleto, kiun al mi donacis iu soldato, preskaŭ knabo. En nia tombejo restis du vicoj de tomboj de tiuj junaj bravuloj, kiuj mortis ĉe fino de milito en nia urbo.

Mia patrino kudris al mi ĉeĥan kostumon - blankan bluzeton kun nigra veŝteto, ruĝan jupeton. Sur kapo mi havis kroneton el artefaritaj floroj. Ankaŭ aliaj infanoj estis tiel vestitaj sur la lerneja foto kun la sama instruistino, kiu nun tute malmemoris la germanan lingvon.

Mia kara panjo naskiĝis, kiam komencis la Unua mondmilito (1913). Do, ŝi travivis du militojn. Ŝi multe rakontis al mi, kiel granda feliĉo estas vivi en paco. Mi havas foton de ŝia patro, mian avon, kiun mi ne ekkonis. Li perdis sanon en Italio sur batalkampo.

Mi travivis preskaŭ tutan mian vivon en paco kaj feliĉo. Mi kun humileco pri tio dankas. Nun vidante armean entuziasman preparon de niaj regantoj, mi tristas.

Mi kun bastono sur artrozaj kruroj staras antaŭ la celo de ĉiu homo – morto ...



Praavino rakontas

Iam vespere, kiam estis tempo dormi, venis avino kiel kutime al nepeto en lian ĉambron legi fabelon. Sed en tiu vespero la nepo ne volis fabelon, li volis babili, Tio ne estis ofte kaj la avino ĝoje diris: „Mi propre ne estas via avino, mi estas via praavino kaj vi estas mia pranepo.“

„Vi estas praavino?“ miris pranepo.

„Mi estas avino de via panjo. Via avino estas mia filino.“

La knabo metis elektronikaĵon sur tableton kaj ektenis manon de sia praavino kaj kun intereso atendis rakontadon. Kaj avinjo komencis: „Mi naskiĝis plifruue ol televidiloj, policaj radaroj, kreditkartoj, kopiiloj, klimatiziloj, laseraj radioj, saĝaj telefonoj, eĉ lavmaŝinojn ni ne havis, kaj tolaĵojn ni pendis sur ŝnurojn eksteren por sekigi.

Mi edziniĝis al via praavo kaj ni vivis kune kaj en ĉiu familio estis paĉjo kaj panjo. Viroj ne portis en oreloj ornamaĵojn. Tatuajon havis nur prizonuloj kaj maristoj. Ĝis mia dekokjaraĝo mi alparoladis ĉiun viron „sinjoro“ kaj virinon „sinjorino aŭ fraŭlino“. Sur ŝtuparo virinoj ĉiam ĝuis lokon ĉe teniloj kaj en lifton envenadis ĉiam la unuaj. Viroj malmetadis ĉapelon dum saluto kaj ankaŭ kiam ili envenis ĉambron. Viroj malfermadis pordon kaj helpadis al virinoj surmeti mantelon. Ni havis bonajn rilatojn kun familianoj kaj ni vizitadis ofte eĉ malpli proksimajn gekuzojn. Telefonoj estis en budoj surstrate kaj en poŝtoŝtupoj kaj ni funkciigis ilin per

moneroj. Ni havis radioaparaton „sur drato“ kun unu programo. Iuj lertaj homoj kapablis mem konstrui radioaparaton por kapti eksterlandajn programojn. Mia patrino ne posedis glaciŝrankon nek lavmaŝinon, varman akvon ŝi varmigis en potego kaj tolaĵon ŝi lavis mane en ligna ujego. Kiam mi estis matura kaj edzinigita, dudek jarojn post la milito, mi jam povis aĉeti lavmaŝinon. Nur poste aperis televidiloj kun malgranda ekranon. Ĉiun tagon ni devis en horloĝoj streĉi risorton kaj kontroli, ĉu vekilo estas startita. Ne estis bankomatoj, sendrataj telefonoj, komputoroj, elektronikaj ludiloj, mikroondaj fornoj, eĉ elektraj fridujoj kaj lavmaŝinoj. Tolaĵojn ni somere blankigis sur herbejo ĉe rivero kaj tapiŝojn ni purigis per batiloj ekstere. Se ni tro petolis, gepatroj avertis nin infanojn, ke per tiu ĉi batilo ili punos nin. Voje el leciono pri violono mi aĉetadis kun amikino kornbulkon je 30 heleroj kaj en paperon acidan brasikon je 20 heleroj. Unu krono havis 100 helerojn. Bonbonojn oni vendis laŭ pezo en papera saketo. Kafajn grejnojn aĉetadis mia patrino kaj hejme ni muelis ilin mane per muelilo.“

La nepo, kiu ĝis nun atente aŭkultis, penseme diris: „Sed avinjo, ĉu vi estas tricentjara?“

„Ne, ne karulo, mi aĝas nur 87 jarojn,“ diris kun rideto avino. „Ĉio, pri kio mi rakontis al vi, estas vero vereca. Mi konas multajn okupojn, kiujn vi neniam faros. Pri tio mi estas iom majgaja.“

Kaj avino vidante, ke okuloj de la nepo fermiĝis, mallumigis lampeton kaj senbrue foriris ankaŭ dormi.

JoDo, 2025.

En mia e-kesto aperis tiu ĉi skribo de nekonata ulo:

Metu ĝin en oran kadron!!!

Eminentaj vortoj de ĵurnalisto el Skynews en Aŭstralio
al homoj, kiuj manifestis je klimato.

„Vi estas generacio, kiu ĝuas klimatizon en ĉiu klaso. Via lernado estas starigita sur komputiloj, televido, tutan tagon vi uzas elektrajn aparatojn.

Anstataŭ irado, vi uzas ĉiujn tipojn de trafiko, multajn de vi transportas gepatroj aŭte. Vi ĉiuj estas la plej grandaj konsumantoj de varoj en historio de homaro. Vi konstante aĉetas novan vestaĵon, por esti laŭmodaj, malgraŭ ke viaj aĵoj de pasinta jaro estas uzeblaj. Preskaŭ neniu el vi kapablas ripari vestaĵojn aŭ kudri per kudrilo ...

Viaj manifestacioj, protestoj, estas sciigataj per elektronikaj iloj. Saĝajn telefonojn vi uzas dum 24 horoj tage. Kun ĉiuj viaj elektronikaj ludiloj vi estas la plej granda konsumanto de energio.

Homoj, antaŭ via manifestacio: malŝaltu hejtadon, iru piede lernejon, malŝaltu viajn ludilojn, prenu kaj legu libron, preparu mem sandviĉon, anstataŭ aĉeti ĝin en plasta paketo.

Sed nenio el tio ĉi okazos, ĉar vi estas egoismaj, malbone edukitaj, manipulitaj de homoj, kiuj uzadas vin kaj diras al vi, kiel vi faras majestajn agojn, dum vi ĝuas kaj distriĝas kun frenezaj okcidentaj luksoj.

Vekiĝu kaj fermu buŝon. Serĉu faktojn kaj komencu plibonigi mondon mem kaj komencu ĉe vi kaj ĉesu admoni homojn, kiuj vivis tutan propran vivon daŭre bontenan.

Vi ankoraŭ nenion kreis, konstruis, Ĉion tion faris homoj, kiuj nun estas maljunaj, pensiuloj aŭ jam mortis.

Taŭgas, ke tion oni legu en ĉiu familio, ankaŭ en la mia.



Ekzistas en jaro nur du tagoj, kiam vi povas nenion fari, spite vi volus: unu estas la hieraŭo, la dua la morgaŭo. Tiam hodiaŭo estas la plej taŭga tago ami, agi, vivi.

SEP ETAĴOJ, KIUJ FARAS HOMOJN FELIĈAJN.

Iu, mi ne scias kiu, perdis ie tiun ĉi liston. Mi trovis ĝin kaj ĝin mi trovis taŭga por traduko por miaj esperantaj amikoj, esperante, ke ĝi povas eble iom pozitive feliĉigi ilin. La listo portis surskribon: **SEP ETAĴOJ, KIUJ FARAS HOMOJN FELIĈAJN.** Tiel eĉ vi povas tion legi, eble praktiki ...

1. Feliĉaj homoj ĝuas ordinarajn momentojn

Antaŭ nelonga tempo mi rigardis tra fenestro infanojn, kiel saltas sur trampolino. Estis bele vidi ilian ĝojon. Se vi konos krei en si mem dankemon je tiaj ĝuoj, via vivo neniam estos vaka.

2. Feliĉaj homoj serĉadas komunumon kaj planas kunvenojn

Kelkaj el miaj amikoj instruis min per ilia ekzemplo: anstataŭ paroloj – estus bone kunveni, efektive ion proponi, planon kaj realigi ĝin. Tiaj amikoj estas plej valoraj. Ankaŭ vi povas esti tiu, kiu alportos al via komununo ĝojon.

3. Feliĉaj homoj vivas kviete kaj tute ne komparas sin kun aliaj

Iaj homoj posedas sanan ambicion, aliaj homoj neniam estas kontentaj. Feliĉaj kaj sukcesaj homoj, kiujn mi konas, havas en si forton plibonigi aferojn, ili estas kontentaj kun si mem, kiel ili ludus sian propran rolon en sia propra teatraĵo kaj tute neglektas pri ludoj de aliaj.

4. Feliĉaj homoj tenas promesojn, kiujn ili donis al si mem

Unu el miaj la plej bonaj decidoj de mia vivo mi faris dum lerneja tempo, kiam mi aliĝis al teamo de kunkuremaj knaboj. La teamo estis konkurema kaj mi iom post iom kapablis kuri 110 kilometrojn semajne. Mi lernis por ĉiam plenumi promesojn.

5. Feliĉaj homoj plenumas planojn ĝis fino

Rutino de feliĉa homo povas esti, ke li lasas sian vivon senzorge pasi. Sed mia sperto estas malsama. Feliĉaj homoj kondutas amuze, sed fakte estas seriozaj, pripensemaj. Kreas planojn kaj ankaŭ plenumas ilin. Tiu eco fermas lian vivstrukturon kaj sencon kaj ili atingas siajn celojn.

6. Feliĉaj homoj perceptas sencojn de aliaj homoj

Estas bone konduti al homoj inde, ĉar tio estas dece, ĝuste. Tia homo estas pli simpatia. La pordoj plifacile malfermas. Se vi estas empatia, vi ricevas okazon por reveno de viaj bonaj aferoj.

7. Feliĉaj homoj gimnastikas

Mi konas iuspecajn homojn, kiuj vivas belan vivon, spite ili ne gimnastikas. Sed regula movo estas bona investaĵo por estonto, kiun vi povas por vi mem fari. Dum ekzercado povas multo da problemoj elvaporigi, prefere gimnastiku regule.



Pri oktopusoj

skribas sciistino Montgomery en la libro „Ĉu oktopusoj havas animon?“ Elprenite laŭ artikolo de Monika Kuncová el Magazin de |7-a aprilo 2023.

Oktopuso havas ok kaptobrakojn, havas buŝon sub kaptobrako, bekon similan kiel papago, lango havas dentojn. Koroj estas tri – du movigas sangon en tuta korpo, la tria koro movas sangon al brankioj. Ilia sango estas blua, ĉar oksigeno distribuas kupron, ne feron kiel ekzemple ĉe homoj. Ĝi povas kiel serpento ataki per veneno. La longeco povas kreski ĝis du kaj duono da metroj kaj pezo ĉirkaŭ 50kg. Oktopusoj movas per movoj de ĉiuj kaptbrakoj, sed ankaŭ kapablas paŝi mem per du kiel animaloj. Ilia genomo malsimilas homan kaj estas tute nekonata ĉe pensado de senspinuloj. Oktopusoj kapablas penetri truon grandan kiel oranĝo.

Tamen la plej interesa eco de oktopusoj estas ilia inteligenteco. Oni povas kompari oktopusojn kun hundoj aŭ malgrandaj simioj, sed ĉe oktopusoj estas tio kiel en „sci-fi“, kiel uloj el aliaj mondoj. Unu el manifestacioj de ilia inteligenteco estas perfekta kapablo de mimikro kun ega rapideco, bunteco kaj imito de aliaj animaloj. Tion ili faras per speciale lokitaj neŭronoj en kaptbrakoj, kiuj parte memstare pensas. Oni povas troige diri – oktopusoj havas naŭ cerbojn, ĉar kaptbrakoj

sentas lumon kaj palpas guston. Perditaj kaptbrakoj povas denove alkreski. Suĉiloj sur kaptbrakoj ĉe matura ulo nombras ĝis 1.600. Ili povas levi eĉ 14 kg.

Oktopusoj kompare al korpo havas grandan cerbon. Verŝajne pro tio ili transvivas spite de sia tre vundebla korpo. Ili ankaŭ konstruas por si dometojn el plastaĵoj, rubaĵoj kaj aliaj materialoj, per kiuj homoj malpuriĝas maron. Kapablecon lerni havas oktopusoj danke al longdaŭra kaj mallongdaŭra memoro. Ni povas esti feliĉaj, ke oktopusoj vivas averaĝe nur 3 – 5 jarojn, ĉar homoj povus havi seriozan konkuranton. (Palentologo Štěpan Rak opinias, ke oktopusoj povus homojn anstataŭi.)

Oktopusoj per kaptbrakoj malfermas kovrilojn de glasoj por akiri frandaĵojn. Ili estas tre scivolemaj kaj fuĝas pli rapide ol Houdini.

En la jaro 2014 fiŝkaptistoj elprenis el maro junan vunditan masklon kaj transportis ĝin al akvario en havenan urbon Napier sur Nov-Zelando. Ĝi ricevis nomon Inki. Ĝi vivis kun homoj dum du jaroj ŝatata de ili. Post tiuj du jaroj ĝi pezis preskaŭ tri cent kilogramoj, ĝi iun tagon frumatene tra malgranda truon en supra parto de akvario elrampis sur plankon kaj per deflua tubo larĝa 15 centimetroj penetris en oceanon. Ĝiaj homaj amikoj ne pensas pri ĝia malfeliĉo aŭ soleco, ĝi estis

simple scivola. Nun ĝi mankas al ili kaj ili deziras al ĝi bonan farton en nova vivo.

Personaleco de oktopusoj diversiĝas. Ili estas esploremaĵoj, singenaj aŭ iniciatemaj. Ili bone interreagas, superas malfidon kaj interreagas eĉ kun aliaj specoj de vivuloj. Ili ŝatas delikatsentajn palpojn. Ili uzas objektojn kiel iloj, ludas. Verŝajne emocias, eble dum dormo sonĝas.

Kelkaj senprofitaj asocioj en mondo unuiĝis, por ke EU malpermesu oktopusojn bredi por nutraĵindustrio.



Artefarita inteligenco kondukas autonome, ni ne havas eblecon kontroli ĝin. Ni mem ne scias kiel ekzakte ni mem pensas.

„La gepatroj de ĝi“ avertas nin !!

Fenomeno de rano en poto en varmigata akvo

La fenomenon unuan fojon priskribis Carl Gustav Jung (1875-1961).

„En poto kun akvo metita rano komencas kondukti strange, kiam oni la temperaturon de la akvo varmigas ĉirkaŭ 60 gradoj. Kiam oni elprenas ranon nun el la akvo kaj metas en akvon 22 gradan, rano el la akvo elsaltos kaj revenos en varman. Same okazas ĉe 65, 68, kaj 72 gradoj. Dum pli alta temperaturo jam la karno de la rano difektiĝas, sed la rano pri tio ne reagis.“

Tiun ĉi fenomenon oni metas kiel ekzemplo malrapida politika influado de socio, alie nomata ankaŭ metodo de tranĉado de salamoj per malgrandaj pecetoj, aŭ „fenestro de Orton“. Tiel oni pliefike kaj ŝajne kviete povas trudi al socio publikan opinion, kiu ĝin detruas iom post iom plibone ol perforto.



Elon Musk venis en kafejon, kaj ĝiaj vizitantoj tuj iĝis miliarduloj – averaĝe.

Por iĝi miliardulo ne necesas havi grandan salajron, sed elpigi la malgrandajn salajrojn al aliaj.

Lernolibroj pri ekonomiko instruas: „Donu al la homoj ne monon, sed fiŝkanojn por ke ili mem sin nutru!” Kion efektive ordonas registaraj ekonomikistoj: „Vendu al la homoj fiŝkanojn kredite kaj ŝtatigu ĉiujn akvejojn. Do ili pagos samtempe la kreditojn kaj la fiŝadon!”

Se oni trovas simion, kiu kolektus kaj kaŝus pli da bananoj, ol ĝi povas manĝi, dum ĝia gregoj malsatas, oni rakontus pri ĝi en lernolibro pri animala patologio. Kiam tio okazas inter homoj, oni metas ties portreton sur la kovrilon de „*Forbes*”.

Apple eldonas novajn telefonojn tro rapide, do ĝiaj aĉetantoj ne havas tempon por pagi kreditojn de la antaŭaj modeloj.

En juĝejo: – Kial vi rabis la bankon? – Sed unue ĝi prirabis min!

Kio estas riĉulo? Tio estas homo, kiu sukcesis vendi al la aliaj vekhorloĝon, kiu vekos ilin matene, por iri al laborejo, kie ili laboros, por pagi la vekhorloĝon.

Ju pli aĝa estas la riĉa edzo, des pli facile estas ami lin ĝis la morto.

Impostisto akuzas la riĉulon:

– En via impostdeklaro vi indikis nur etan parton de viaj enspezoj!

– Sed kion fari, se la sekcio „enspezoj” en la deklaro estas tro eta, kaj duono de la nuloj ne enspaciĝis?

Plukis Stano Belov

Okazaĵo en la noktomezo

Yin Jiaxin

Li estas taksia ŝoforo. En frua somera vespero, li ĝuis freŝan aeron kun la fenestro malfermita, dum li malrapide direktis la aŭton serĉante pasaĝeron. Subite, lia telefono sonoris, kaj la vokanto estis najbaro de lia supra etaĝo.

„Ha lo, amiko. Jam estas profunda nokto, vi geedzoj ne tumultu. Se vi volas vin distri, almenaŭ faru trankvilan bruon. Bonvolu diri al via edzino, ke ŝi ne krii tiel laŭte. Mi povas klare aŭdi ĉion, kaj sentas tre embarase.” Liaj manoj ekstremis sur la stirrado. La varmo forlasis lian vizaĝon. Evidente la edzino kokris lin, dum li laboris. Li povis preskaŭ vidi la du fiombrojn interplektiĝantajn sur sia propra litotuko. Li volis tuj hejmeniri, sed bedaŭrinde lia aŭto estis tro malproksime de lia loĝejo. Li sciis, ke kiam li alvenos hejmen, tiu fiĉaro estos jam fininta la adulton. Amara gusto plenigis lian buŝon. La vento en la momento sentiĝis malvarma kontraŭ lia vizaĝo. Post la tagiĝo la aŭto glitis tra stratoj, portante lin al hejmo, kiun li ne plu konsideris hejmo. Vidinte la edzinon li ŝajnis, ke ĉio estas en ordo. En la dormoĉambro li kaŝe instalas mikrokameraon direktitan al la lito. De tiam, dum siaj noktaj deĵoroj, li foje observis la dormoĉambron per la poŝtelefono.

Iun noktomezon li parkumis la aŭton ĉe la fervoja stacidomo kaj atendis pasaĝeron. Li kutime ŝaltis la poŝtelefonon por observo. Kun miro li vidis, ke lia edzino kaj viro, tute nudaj, estas amorantaj surlite, dum la senpudora virino ĝemadis gaje kaj plezure. Sango abrupte supreniĝis al

lia kapo. Li gapis je la ekrano tiom kolere, ke li eĉ ne perceptis, ke virina pasaĝero malfermis la aŭtopordon kaj eniris.

La virino diris surprize kaj honteme: „Sinjoro, ĉu vi pasigas atendan tempon per spekti pornan videon?” La voĉo de la virino renormaligis lin el la ĉagrenita stato. Kun tristo kaj angoro li diris: „Tio ĉi estis rekta dissendo el la kamerao en mia loĝejo!”

„Ho,” la virino miris konfuzite. Ŝi vole-nevole ĵetis la duan rigardon al lia telefona ekrano kaj ekstuporis. Li malŝaltis la telefonon kaj startigis la aŭton, demandante la virinon: „Kien vi iras?”

„Al via loĝejo,” respondis la virino decideme.

„Al mia loĝejo?” Li aspektis konfuza.

„Jes,” la virino laŭtigis sian voĉon.

„Por kio?” Li estis ankoraŭ perpleksa. La vizaĝo de la virino ruĝiĝis de indigno, kaj ŝi elpremis vortojn tra siaj dentoj: „Tiu fia viro estas mia edzo!”



**Se vi faras ion, kion neniu sciis, eble vi
prefere ne faru tion.**

Konsilas Jaruš el Klementinka.

El la libro LANDO, KIU VEKIĜIS – Rakontoj el Ukrainio

verkis Kalle Kniivila, eldonis MONDIAL, Novjorko 2023.

Gravaj jaroj en historio de Ukrainio

Ekde Kijiva Rusujo ĝis Rusia imperio

988 – 989 – Volodimir la 1-a de Kijivo akceptas kristanismon de Bizanco kaj edziĝas al la fratino de la bizanca imperiestro Anna.

1097 – La Sofia katedralo en Kijivo estas finkonstruita

1240 – Mongoloj rabinvadas Kijivon

1362 – La mongoloj estas forpelitaj el Kijivo kaj la ĉefa parto de la ukrainaj teritorioj iĝas parto de Litovio.

1569 – La Pola-Litova unio estas formale starigita kiel ŝtato per la Lublina Unio. La ĉefa parto de la ukrainaj teritorioj nun apartenas al la pola parto de Unio.

1648 – Kozakoj gvidataj de Bohdan Ĥmelnickij ribelas kontraŭ Pollando.

1654 – La Unio en Perejaslav. La kozakoj alianciĝas kun Moskvo kontraŭ Pollando. Post milito inter Moskva regno kaj Pollando la parto de Ukrainio oriente de Dnepro iĝas parto de la Moskva regno (Rusujo).

1709 – La kozaka estro Ivan Mazepa aliancas kun Svedio, sed en Poltava la svedoj kaj kozakoj estas venkitaj de la caro Petro la 1-a.

1795 – La tria divido de Pollando. Pollando perdas sian sendependecon kaj la ĉefa parto de la hodiaŭa Ukrainio iĝas parto de la Rusa imperio, kiun Petro la 1-a deklaris fondita en 1721.

1815 – La Viena kongreso post la Napoleonaj militoj fiksas la limon inter Aŭstrio kaj Rusio por la sekva jarcento. La limo trapasas tra ukrainiaj teritorioj, sed la ĉefa parto de hodiaŭa Ukrainio restas sub rusa regado.

1863 – Preskaŭ ĉiuj publikaĵoj en la „malgrandrusa lingvo“ estas malpermesitaj en Rusa imperio.

1876 – La malpermeso de publikaĵoj en la ukraina lingvo estas severigita. Ankaŭ teatraj prezentaĵoj nun estas malpermesataj.

1881 – Kelkaj teatraj prezentadoj denove estas permesitaj.

1893 – La ukraina iĝas la lerneja lingvo en Galicio en la aŭstria parto de Ukrainio.

1895 – Ankaŭ infana literaturo en la ukraina estas malpermesita en la Rusa imperio.

1905 – La unua Rusia revolucio. La malpermeso de ukrainaj publikaĵoj estas nuligita. La ukraina gazetaro rapide evoluas.

Revolucio

1914 – Ukrainio iĝas centra scenejo de la bataloj de la unua mondmilito.

1917 – Post la februara revolucio Ukrainio ekhavas aŭtonoman statuson sub la provizora rusa registaro. Post la oktobra revolucio la bolŝevikoj starigas sovetan registaron en Ĥarkivo. La milito inter Soveta Rusio kaj Ukrainio komenciĝas.

1918 – Ukraina Popola Respubliko kun ĉefurbo en Kijivo deklaras sin sendependa kaj petas helpon de la centraj potencoj. En februaro la bolŝevikoj invadas Kijivon kaj iniciatas ruĝan teroron – miloj da suspektataj kontraŭuloj de la bolŝevika regado estas ekzekutataj. En marto germanaj trupoj forpelas la bolŝevikojn kaj okupas Kijivon. En novembro en

Lvivo estas deklaranta la estiĝo de Okcident-ukraina Popola Respubliko. Polaj trupoj prenas Lvivon.

1921 - de la ukraina teritorio, inkluzive de Lvivo, iĝas parto de Pollando. La centro de Ukrainio iĝas Ukraina Soveta Respubliko.

Sovetio

1922 – Sovetio estas fondita. Dum dek jaroj daŭras politiko de ukrainigo la statuso de ukrainaj lingvo kaj kulturo estas fortigita en Ukraina Soveta Respubliko.

1928 - La kolektivigo de la terkulturado komenciĝas.

1932 – 1933 – Milionoj da ukrainoj pereas en la malsatkatastrofo – holodomor – kiam la sovetaj regantoj konfiskas la kompletajn rikoltojn.

1933 – Fino de la politiko de ukrainigo. Forigo de la ukraina komunisma partio komenciĝas kaj kulminas en la jaroj 1937-1938.

1939 – Stalin alianciĝas kun Hitler por disdividi orientan Eŭropon. Germanio kaj Sovetio inter si disdividas Pollandon. Okcidenta Ukrainio kun Lvivo iĝas parto de Sovetio.

1941 – Hitler komencas sian atakon kontraŭ Sovetio. Ukrainio estas centra scenejo de la bataloj dum granda parto de la dua mondmilito.

1944 – Sovetio rekonkeras Ukrainion. La krimeaĵ tataroj estas ekzilitaj al Centra Azio.

1954 – Krimeo iĝas parto de Ukraina soveta respubliko.

1963 – Petro Ŝelest, la patriestro de Ukrainio, komencas diskretan politikon de subteno al la ukrainaj lingvo kaj kulturo.

1972 – Ŝeŝt estas akuzata pri naciismo kaj eksigita. Lia posteulo Volodimir Ŝĉrbiskij enprizonigas centon da disidentoj, disciplinas la kulture vivon kaj fortigas la statuson de la rusa lingvo en Ukrainio.

1985 – Miĥail Gorbaĉov iĝas ĝenerala sekretario de komunisma partio de Sovetio kaj inicias modestajn reformojn.

1986 – La Ĉernobila katastrofo

1988 – La unuaj grandaj opoziciaj manifestacioj en Ukrainio. La partoprenantoj plej multas en Lvivo.

1990 – La unuaj parte liberaj elektoj al la parlamento de Ukrainio.

Sendependeco

1991 – Post la aŭgusta puĉo en Moskvo la parlamento de Ukrainio aprobas deklaron de sendependeco. Majoritato de la ukrainianoj subtenas ĝin en referendumo. Leonid Kravĉuk iĝas prezidento de Ukrainio post liberaj elektoj. Sovetio ĉesas ekzisti fine de la jaro.

1994 – Leonid Kuĉma estas elektita prezidento. Ukrainio fordonas siajn nukleajn armilojn, La tri nukleaj potencoj Rusio, Usono kaj Britio subskribas la Budapeŝtan memorandon, kiu celas garantii la sendependon kaj teritorian integrecon de Ukrainio.

1997 La sovetia Nigramara floto estas dividita inter Rusio kaj Ukrainio. La ĉefan parton ricevas Rusio, kiu krome rajtas lui parton de la haveno en Sebastopolo dum dudek jaroj.

1999 – Leonid Kuĉma reelektita kiel prezidento.

2004 – La oranĝa revolucio, Viktor Juŝĉenko elektita prezidento de Ukrainio.

2010 – Viktor Janukoviĉ elektita prezidento de Ukrainio. La lukontrakto de la rusa floto en Sebastopolo estas longigita ĝis 2042 post pugnobataloj kaj ovoĵetado en parlamento.

2013 – Viktor Janukoviĉ en la lasta momento post premo el Moskvo ŝanĝas sian opinion kaj rifuzas subskribi la asociiĝan interkonsenton de Ukrainio kun Eŭropa Unio. Manifestacioj komenciĝas en Placo de Sendependado en centro de Kijivo en novembro.

2014 – Janukoviĉ fuĝas al Rusio post malsukcesaj provoj haltigi la manifestaciojn perforte. Rusio aneksas Krimeon, starigas la „popolan respublikon DNR kaj LNR“ (Donjeck kaj Luhansk) kaj ekigas militon en orienta Ukrainio. Petro Poroŝenko estas elektita prezidento de Ukrainio.

2015 – Post la dua Minska interkonsento en februaro la kontaktlinio inter la batalantaj armeoj stabiliĝas kaj la milito iĝas malintensa.

2019 – Volodimir Zelenskij elektita prezidento de Ukrainio.

2022 – Rusio komencas plenskalan invadon al Ukrainio, sed ne sukcesas kapti Kijivon. La rusiaj trupoj kaptas la tutan marbordon de la limo ĝis Krimeo, sed devas retiriĝi el norda Ukrainio, el la provinco Ĥarkovo en la oriento kaj el de la provinco de Ĥerson en la sudo. Poste Rusio komencas grandskalan bombardadon de la civila infrastrukturo de Ukrainio.

Kalle Kniivila, aŭtoro de la libro „Lando kiu vekigis“ skribas sur paĝo 161

Alian tagon mi trovas min ĉe la preĝejo de Petro kaj Paŭlo en la absoluta centro de Lvivo, plej ofte nomata la Garnizona preĝejo. Iam en la 17-a jarcento ĝi estis konstruita por la aŭstria garnizono, inter du mondmilitoj ĝi estis la preĝejo de la pola garnizono. Dum la soveta tempo preĝejoj ne estis bezonataj, la konstruaĵo estis transformita al biblioteka deponejo. La preĝeja halo estis plenŝtopita je altaj librobretaroj. Post la falo de Sovetio daŭris dudek jaroj, ĝis la libroj estis fine forportitaj kaj la preĝejo estis denove preĝejo. La rekonstruado plu daŭras, sed ekde 2010 la grek-katolika eklezio de Ukrainio disponas pri la konstruaĵo.

Sepultoj de pereintoj el la regiono de Lvivo okazas ĉi tie preskaŭ ĉiutage. En ĉi tiu mardo ili estis du.: la 40jara Oleh Pidhorodeckij kaj la 33jara Nazarij Klimkiv. La nomoj oni anticipe diskoniĝas en la retejo de la urba registaro, loĝantoj de Lvivo estas bonvenigantaj al la ceremonio por honori la falintajn batalantojn. En la retpaĝo eblas legi, ke la plej proksima parenco de Oleg Pidhorodeckij estas lia patrino. La patro de lia avo estis ekzekutita de soveta sekurservo NKVD. Nazarij Klimkiv estas funebrata de la edzino, nun vidvino. Ilia filo ĵus iĝis dumonata kaj ankaŭ ne scias, ke li perdis sian patron.

Ekster la preĝejo atendas homamaso. La sonorilo vokas. Sola vira voĉo malrapide trifoje ĉantas: „Sankta Dio, Sankta Fortulo, Sankta Senmortulo, kompatu nin!“ Ĉiuj falas sur la genuojn antaŭ la ĉerkoj, kiujn portas kamuflestitaj soldatoj, laŭ la strato kaj en preĝejon. Antaŭ ĉiu ĉerko estas portata granda, blu-flava ukrainia flago kaj nigra surtomba kruco kun la nomo de la perinto.

En la preĝejo la ĉerkoj estas lokataj en la meza koridoro kaj ĉirkaŭataj de honora gardistaro. La nelonga modestatona prediko de la pastro plenas je funebro kaj dankosento al la viroj, kiuj donis sian vivon por la libero de Ukrainio. Li parolas pri amo, ne pri malamo. Pri tio, kio signifas zorgi pri proksimulo, doni ĉion por la proksimulo. Pri la libero. „Ni ne scias, kion portos la estonteco“, li diras, starante apud unu el la ĉerkoj kun mikrofono en la mano. Li aspektas serioza kaj iom laca. Li jam tro da fojoj faris ĉi tion.

La Marsa kampo apud la tombejo de Likaĉiv iam estis aranĝita kiel memorejo pri la sovetaj herooj de la dua mondmilito. Nun granda parto de la verda herbejo estas trafosita kaj transformita al heroaj tomboj de la pereintoj en la milito de la jaro 2022. Jen la blu-flavaj flagoj kaj nigraj krucoj staras en longaj vicoj. Sur ĉiu kruco pendas portretoj: junaj kaj mezaĝaj viroj en militaj uniformoj. Kelkaj serioze mienas, aliaj ridetas. Ĉiuj estas mortaj.



SILENTO

Silento estas armilo, kiun la saĝuloj majstras. Ĝi ne estas uzata por fuĝi, sed por observi tion, kion kolero malhelpus vin vidi. Estas aferoj, kiujn estas pli bone lasi nediritaj, ne ĉar ili ne meritas esti diritaj, sed ĉar tiu, kiu devas aŭdi ilin, ankoraŭ ne estas sufiĉe matura por kompreni.

Lernu silenti, kiam ĉio invitas vin reagi. Lernu rideti, kiam la mondo volas vidi vian koleron. Jen vera forto: restu trankvila, kie ĉiuj aliaj koleras.

Kaj pardonu! Avo diras al vi: Ne estas eble forgesi, kio estis farita al vi, sed bone estas rifuzi estiĝi kaptito de via doloro. Ĉar tiu, kiu ne pardonas, portas ĉiutage la pezon de tiu, kiu vundis vin. Vi pensas, ke vi punas alian personon tenante rankoron, sed estas vi mem, kiun vi malrapide mortigas. Pardonu, ne por ili, sed por via propra paco.

Ĉi tiu mondo bezonas homojn, kiuj alportas pacon, ne homojn kiuj incitas. Homoj, kiuj resanigas, ne homojn, kiuj remalfermas malnovajn vundojn. Kaj jen kion ni faras ĉi tie: ni instruas pacon, memregadon kaj fidon. Ni ne atakas iun ajn, ĉar ĉi tie ni ne nur parolas al oreloj, ni parolas al koroj.

Kore, Honoré Sebuhero de Rutshuru Honore Sebuhero
honsebn@gmail.com



Miloj da detalaĵoj akompanas homojn

J. Drahotová

Multfoje min konvinkis sperto, ke malagrablajn detalaĵojn oni konstruas intence, artifike en fabrikoj. Ekzemple en libro de Roman Dobrynski „Bona Espero“ rakontas Guseppe Gratapaglia pri kutimo en firmao FIAT, kie li laboris post la dua mondmilito pri fabrikado de aŭtomobiloj: „Tie oni fabrikis aŭtojn, por ke ili bone funkciu nur dum 5 jaroj – kiam daŭras tempo por garantio. Poste la riparo estas bonvena.“

Ja, miaj spertoj estas identaj kun glaciŝranko, kun lavmaŝino ... kaj ekzistas eĉ speciala vorto en mia ŝatata ĉeĥa lingvo por tiu fenomeno: *kurvítko* - malgranda detalaĵo, sen kiu la aparato ne povas funkcii, ĝi estas neatingebla en vendejo, aŭ multekosta, aŭ por metiistoj tre komplike ellaborata, la riparo valoras prezon de la tuta aparato.

En la sama senco oni uzas la vorton „*háček*“ (haketo). Ĝin oni povas trovi en asekuraj dokumentoj, kie pri la plej gravaj informoj kaj kondiĉoj estas skribite per tre malgrandaj literoj aŭ ekster la ĉefa teksto k.s.

Similaj artifikoj ekzistas miloj en nia mondo kaj kaŭzas „*zádrhel*“ eĉ „*průser*“, vortoj kiuj ne troviĝas en vortaroj kaj kaŭzas damaĝojn, malfeliĉojn, katastrofojn, miskomprenojn, malgajojn ...

Eĉ min sufiĉe ofte ne preterpasis tiuj malagrablaj kaŭzitaj per tiuj „malgrandaĵoj“

Ekzistas sed ankaŭ eta okazaĵo, kiu venas neatendite kaj tuj ŝanĝas situacion agrable. Tia feliĉeto nomiĝas en la ĉeĥa

„*pokakané štěstíčko*“ aŭ feliĉo „el infero“. Ankaŭ tiuj pozitivaj detalaĵoj, kiuj ŝanĝas ĉion, okazas ofte. Onidire faras tion anĝeloj.

Ekzemple mi legis en libro pri Andreo Cseh de Ed Borsboom, kiel Andreo hazarde trovis en la jaro 1911 afiŝeton en trajno pri internacia lingvo, kie oni proponis je ridinda prezo gramatikon kun vortaro. Li abonis ĝin. Kaj post tralego de tiu „Ĉefa Ŝlosilo“ dum unu posttamezo li trovis sian destinon.

Homaj vivoj estas plenaj de tiaj detalaĵoj kaj neniu scias, kiam ili neatendite venos kaj ŝanĝos ĉion al bono aŭ malbono. Ie mi legis, ke tiuj la plej valoraj persaj tapiŝoj enhavas en sia perfekta desino ie intensan eraron por feliĉo.

Mi ankaŭ turmentas pro tiu malgranda diabla detalaĵo longajn jarojn. Ĝi estas vorto Esperanto. Ĝi ne permesas al mi realigi mian dudekjaran tradukan laboron. Kial? Nu, kiam mi renkontis Esperanton, mi estis aĝe proksime al pensio. Tamen mi rapide ĝin ekŝatis kaj primajstris, mi sukcesis eĉ instrui ĝin kaj fondi rondeton de amikoj. Mi pensis, ke por publiko estas necese proponi esperantajn originajn verkojn en nia nacia lingvo. Ŝajnis al mi, ke niaj esperantanoj ŝatas traduki nur de la ĉeĥa al Esperanto. Do mi pasie komencis traduki kaj traduki esperantajn klasikaĵojn al la ĉeĥa por konvinki pri valoro de internacia lingvo. Nur malofte mi trovis volontan eldoniston. Sufiĉis menciigi detalaĵon: temas pri Esperanto.

Tradukoj malgaje kuŝas en mia tirkesto ĝis nun.



Legendo el Kubo


Juna Amiko, septembro 2025 n-ro 3, p.25

Pri malbone ŝtel-imuna gregejo

Pedro Betancourt estis fondita en la jaro 1825. Tiam la vilaĝo nomiĝis Macurijes, ĉar ĝi estis situata en savano, kiu havis saman nomon. En la vilaĝo troviĝis gregejo kun multaj brutaroj, sed dum certa nokto okazis, ke la bestoj mistere malaperis. La vilaĝanoj pensis, ke tiu gregejo ne estis bone sekurigita kaj pro tio la bestoj eliris el la ejo kaj perdiĝis en savano. De tiu momento la vilaĝanoj komencis nomi la vilaĝon „vilaĝo de malbone ŝtel-imuna gregejo“.

Kelkajn tagojn poste okazis, ke en la vilaĝo estis vojrabistoj, kiuj probable ŝtelis la bestojn. Tamen la vilaĝanoj volis kredi, ke la bestoj eliris el la gregejo pro tio, ke ĝi estis malbone ŝtel-imuna.

Malgraŭ tio, ke la nomo de la vilaĝo jam ŝanĝiĝis, tiu antaŭa „vilaĝo de malbone ŝtel-imuna gregejo“ ne estis forgesita.



Milan Lasica, slovaka artisto:

Ĉu vi memoras tempojn antaŭ interreto?

Tiam ni pensis, ke homan stultecon kaŭzas manko da informojn, sed ni eraris.



Testudo kaj la princino

Verkis Kokou
SAGBADJELOU, laŭ nacia fabelo,
Togolando

La reĝo de vilaĝo havis filinon tiel belan, ke preskaŭ ĉiuj bestoj amis ŝin. Ili deziris edziĝi kun ŝi, sed ŝia patro neniam akceptis.

Iam, ĉar la reĝo bezonis pajlon por ripari tegmenton de sia domo, li decidis liveri la filinon nur al tiu, kiu serĉos unu amason da pajlo kaj estos la unua ĝin alportinta. Ĉiuj ĝojegis kaj foriris por la pajloserĉado. Tio troviĝis iom for de la loĝdomo. Malgraŭ mokvortoj diritaj ĝiaflanke, ankaŭ Testudo konkuris. Ĝi konsciis pri sia nerapideco kaj tiam pensis kiel ĝi povus venki. Irante ĝi kunportis sian tambureton. Ĝi kaŝis ĝin ĉe la loko kie bestoj fortranĉis pajlon kaj rapidege foriris. Testudo estis la lasta. Je tiu momento, ĝi ekludis la tambureton; ĝia melodio korplaĉis kaj trafis la rivalojn eĉ la unuajn pli rapidajn. Ili reiris malantaŭen, ĉar ili estas dancemaj. Ili renkontis Testudon al kiu ili demandis: «De kie venis la melodio?». La ruza testudo ĉesis ludi, montris al ili foran lokon. Ili kuris tien, sed ili serĉadis vane. Testudo paŝis al hejmo, tamen ĉiuj aliaj bestoj denove preterpasis ĝin. Ankoraŭfoje, testudo aŭdigis la belan melodion. La konkurantoj ne povintaj rezisti je tio reiris malantaŭen por malkovri la ludejon. Antaŭ ol ili rememoris sian mision, Testudo jam atingis la reĝdomon kaj donis sian pajlon. Nur post tio alvenis ĉiuj aliaj kurante. Kiel promesite, la princino estis transdonita al Testudo antaŭ la publiko tre enviema.

Je la fino

Lurdes Oliveira, 2026.

Mi nomiĝas Karulo kaj mi rakontos al vi pri mia nuntempa vivo. Ĉiumatene, kiam mi vekigis mi serĉas mian edzinon en la lito, sed ŝi ne estas tie. Mi provas aŭdi la bruon de la infanoj en la domo, sed estas silento. Tiam mi memoras, ke mi estas 80-jaraĝa viro en maljunulejo. La edzino mortis antaŭ 10 jaroj, la gefiloj ne plu estas infanoj kaj miaj kruroj ne plu obeas mian volon. Mi kuŝas en la lito ĝis Marko, la juna flegisto, alvenas. Mi vojaĝas al la pasinteco: mi memoras la feliĉajn tagojn, kiujn mi iam vivis.

„Kiel vi fartas hodiaŭ, Avĉjo?” – la voĉo de Marko vekas min de miaj memoroj. Mi respondas: „Saluton, Marko. Mi fartas bone, dankon. Ĉu hodiaŭ estas dimanĉo?”

„Jes. Hodiaŭ estas vizitantoj en la maljunulejo. Grava tago por ĉiuj vi, ĉu ne?” – li diras.

Dum Marko banas min kaj vestas min, mi pensas: „Eĉ niajn nomojn ni ne plu rajtas havi. Ni estas simple geavoj. Krom perdi nian familion, nian viklecon, nian decidkapablon, ŝajne maljuneco signifas perdi nian identecon”. Marko sidigas min sur rulseĝo, kvankam mi preferus marŝi iomete per helpo de mia lambastono. Sed Marko ne havas tempon. Estas multaj aliaj homoj por flegi. En granda salono, kune kun aliaj maljunuloj, ni manĝas la kutiman moligitan panon en taso da lakto kvankam ni ja kapablas maĉi kaj nia apetito ne

malaperis. Sed ni ne plu rajtas manĝi bongustan manĝaĵon. Dum la tuta mateno, ni sidas silente. Iuj rigardas la laboristojn, kiuj ordigas la ĉambregon, aliaj fermas la okulojn kaj rigardas internen. „Ili multe laboras ĉi tie. Pro tio, ne estas tempo por babilo kun ni” – mi pensas. Fojfoje sinjorino petegas: „Bonvolu porti min al la necesejo. Mi bezonas iri tien tuj”. Sed la respondo ĉiam estas la sama: „Vi havas vindaĵon, ĉu ne? Mi ne havas tempon nun. Poste... poste...” La lastaj vortoj oni apenaŭ aŭdas, ĉar la laboristoj ĉiam hastas fari la plej gravajn taskojn en la maljunulejo: ordigi la dormoĉambrojn, pretigi la manĝojn, purigi la telerojn...

S-ino Espero parolas iomete kun sia najbarino: „Hodiaŭ, miaj gefiloj vizitos min. Ili venos, mi scias, ĉar ili promesis viziti min ĉiu monate. Eble ili kunportos miajn genepojn. Antaŭ longe mi ne vidas ilin”. Mi scias, ke ili ne venos. Ili neniam venas. S-ino Espero diras tion semajnon post semajno. Ŝi simple esperas. La horoj pasas. Kiam ni vidas, ke oni jam pretigas la tablojn por la tagmanĝo, ni revivas. Nia entuziasmo ne rilatas al la manĝaĵo mem – ĉiam sensala mola io ĝi estas. Dum la manĝo, aliaj homoj estas tie, iliaj voĉoj aŭdeblas, oni eĉ alparolas nin kelkajn frazojn. Ni ekzistas por momente. „Vi ne rajtas manĝi salon” – diras al ni la kuracisto, kiu aperas unu fojon semajne. „Temas pri hipertensio. Vi ne plu estas infano, vi scias”. Tiel, la manĝoj ĉiam estas sengustaj.

Posttagmeze estas vizitantoj. S-ro Luko ridetas, kiam li vidas sian filinon kaj nepinojn aperi ĉe la pordo. Ili babilas gaje, kantas kaj manĝas la bongustan kukon, kiun lia filino

kunportis. Estas lia naskiĝtago. S-ro Luko estas bonŝanca, ĉar lia filino vizitas lin ĉiusemajne. Multaj el ni neniam vidas familianojn. Ĉi-dimanĉe estas aliaj vizitantoj, eta grupo da gejunuloj, kiuj vizitas la maljunulejon de tempo al tempo. Ili alparolas nin dum kelkaj minutoj. „Saluton, avinjo, kiel vi fartas?” – demandas juna Rakel al S-ino Amanda. „Tre bone, dankon. Mi atendas mian filon. Li havas multe da laboro, ĉar li estas fama advokato. Li havas tri gefilojn kaj li multe vojaĝas. Pro tio, li ne havas multe da libertempo por veni ĉi tien. Sed li venos hodiaŭ!”. S-ino Amanda ĉiam pardonas la foreston de sia filo. Ŝi eĉ trovas manierojn senkulpigi lin pro lia porĉiama forgeso. Rakel karesas la vizaĝon de tiu ĝentila maljunulino, ridetas kaj tuj alparolas alian homon. „Kaj vi, avĉjo, kiel vi fartas? Ĉu bone?” „Mia nomo estas Vicente. Mi lacas pro maljuneco kaj suferas je soleco. Sed vi ne kapablas kompreni tion, ĉar vi estas tro juna” – li respondas. „Ne zorgu, avĉjo. Ĉi tie oni flegas vin kaj vi ne estas sola. Rigardu, kiom da avinjoj kaj avĉjoj estas ĉi tie” – diras Rakel. Mi rimarkas la malĝojon en la okuloj de Vicente. Li ŝatus rakonti pri sia vivo, siaj aventuroj, sed ne eblas. Rakel jam estas aliloke. Neniu vere volas aŭskulti nin. „Kia bela avinjo. Ĉu vi bonfartas?” – alia junulo demandas al S-ino Greta. Ŝi kapjesas kaj tuj diras: „Mi estas ĉi tie nur portempe. Mia nevino, kiu loĝas proksime kaj havas grandan domon, promesis, ke ni loĝos kune en ŝia hejmo. Mi nur atendas, ke ŝi venu preni min”. Mi konas tiun sinjorinon de antaŭ 5 jaroj. Ŝi diras la samon, ĉiam, kiam iu demandas ion al ŝi. Sed ŝia nevino neniam alvenas. Je la 17-a horo ni manĝas ian specon de kaĉo. Oni promesis al ni, ke ni rajtus manĝi iom da kuko – la kuko, kiun la familio de S-ro

Luko lasis por ni ĉiuj. Sed tio ne okazas. Ĉu ili forgesas la kukon en la kuirejo? Mi demandas: „Ĉu ne estas kuko?” „Ne. Avĉjo. Pro la diabetoj. Estas tro da sukero en kuko” – iu respondis. Neniu rajtas manĝi iom da kuko, krom la laboristoj mem. Denove la silento, la soleco, la malplenaj horoj. Ni atendas la vespermanĝon, la lasta momento de aktiveco en la tago. Poste, la dormoĉambro. Jam en la lito, mia menso denove vojaĝas al la pasinteco. Mi sopiras pri la vivo, kiu ne plu ekzistas. Ha! La vivo – kia aventuro! Tamen, je la fino restas nur memoroj.



„Kiam iu demandas min, kiel karakterizi Esperanton, mi respondas, ke ĝi estas amo inter logiko, beleco kaj simpleco. Ankaŭ hobia kaj bona antaŭzorgo kontraŭ la Alzheimer-demenco.

Kaj kiam iu demandas, kiuj estas la esperantistoj, mi respondas, ke ili estas amantoj de logiko, beleco kaj simpleco, kiuj ne scias, kio estas demenco.“

**Max Kaŝparŭ grekkatolika pastro, psikiatro, pedagogo,
esperantisto, ĉeĥo.**

Morto

Morto fakte estas ne timinda!
ĝi okazas laŭ regulo de l' granda Naturo!
de neniam al nun, al la senfina onteco homojn
ĉiujn nepre trafas la torturo!
Ĉu imponaj reĝoj, ĉu popolanoj,
ĉu altranguloj, ĉu simpuloj,
neniu povas sin meti en escepto!
tiel estas ankaŭ jen mi, kadukulo!
Juneco, oldeco, malsano kaj morto
estas dum homa vivo kvar sezonoj!
el mia vivo morto estas necesa parto,
per tio mia vivo obeas laŭ rezono!
Nun, miaj gefiloj havas sian familion,
miaj genepoj viglas pompe kiel floroj.
esperantaĵojn mi sendis al E-Muzeo,
kio malŝarĝis min de la tuta koro!
Mi kredas, iuj homoj longe vivas
en homa memoro pere de sia verko!
ĉi tio ja estas unika metodo espera!
Mi bezonas nur poemojn, for fiĉerko!
Ĉiu tago estas donaco de kara Dio,
kiun mi devas trasperti kun ĝojo!
se la fina momento venos al mi,
certe mi kun rideto iros al la vojo!

Gajo, Yuanjiang, Ĉinio.

TRI MIKRONOVELOJ

Solvoj

Timothy BORONCZYK

Usona esperantisto – Bulteno de esperantistoj USA 2025:3

La robotabeloj estis teknikaj mirindaĵoj, senlace flugantaj de floro al floro. Homoj atendis abundan rikolton malgraŭ la malapero de insektoj. Ĉio ŝajnis en ordo ... ĝis aŭdiĝis tondro, kaj ekfalis pluvo. La etaj maŝinoj, bone faritaj sed ne por laboro en pluvo, misfunkciis pro kurtaj cirkvitoj. Plantoj staris silente en la kampoj, atendante polenadon neniam venontan. Tiam la homoj eksciis, ke ne ĉiuj problemoj estas teknologie solveblaj.

Eble vi taksas la rakonton stulta. Homoj sufiĉe inteligentaj por konstrui artefaritajn abelojn estus sufiĉe inteligentaj por antaŭvidi pluvon, ĉu ne? Sed se ili vere estus inteligentaj, ili ne estus detruintaj la medion.

Kiam en Romo

Debra HAMEL usona verkistino

Por plej profite vojaĝi, spertu kiel denaskulo. Akiru frazlibron. Manĝu lokajn specialaĵojn. Vestu sin indiĝene.

Tial Adamo mendis vestaĵojn. Li nun surmetas novan ĉemizon, sed ĝi ne

bone konvenas. Unue konfuzite, li baldaŭ ridas pro sia stulteco kaj rigardas

bildon: Li frue petis, ke AI-bildgeneratoro kreu, kiel stilgvidilon, realisman foton de elegantulo. Li studas ĝin: belulo portanta ĉemizon kiel la lian, memfide rigardanta foren. Adamo tiel pozas kaj, farante neprajn ŝanĝojn, alĝustigas sin al la ĉemizo. Poste li drapiras kravaton ĉirkaŭ la kolon kaj rigardas enspegule dum li ligas ĝin per siaj novaj, sesfingraj manoj — ĝuste kiel en la bildo.

La elmigrintoj

Maurizio “Rico” GIACOMETTO,
Enprozigito de “La elmigrintoj” de Clarence BICKNELL

Kiam tutnova edzo forlasis, plena je espero, la gepatran landon, lin akompanis varme loga vento de somero.

“En la tutnova lando,” li pensis, “mi trovos riĉon. Kaj post la alveno via,” li diris al sia juna edzino, “la feliĉon.”

Post semajnoj, en letero, li lakone skribis: “Kruda lando, penaj provoj. Sed ...” li aldonis, “... mi jam laboras. Mi trafos celon. Rapidu: portu al mi vian belon.”

Post longa pripensado kaj malfacilaĵoj, ŝi finfine decidis sekvi lin en la novan landon. La planado estis longa; la forlaso malcerta. La vojaĝo danĝera. Ili finfine rekuniĝis. Bele estis vidi lin denove. Sur foto tombeja.

Mia viv-aventuro - La lastaj vortoj de viv-ĝuanto

Dua premio en la Esperanta kategorio de la 14-a literatura konkurso „Esperanto ligas homojn.

Jorge Rafael Nogueras, 2025

La kuŝanta maljunulo, mortonta, ekparolis al tiuj, kiuj staris ĉirkaŭ li. „Se vi estus dirinta al mi kiel junulo, ke mia mortolito estos tiel abunde ĉeestata, mi ne estus kredinta vin”, li diris malforte, kun ironia rideto. „Mia tiama vivo estis ege aventur-plena kaj mi neniam havis ajnan planon por la estonteco. Mi neniam restis en unu sola loko dum longa tempo, traveturante la mondon de oriento ĝis okcidento, de nordo ĝis sudo. Mi vizitis la plej belajn (kaj konfesinde eĉ la plej malbelajn!) lokojn de la planedo, kaj spertis multajn el la mirindaĵoj, kiujn nia mondo proponas. Ĉu vi iam vidis akvofalon tiel altan, ke de la malsupro rigardante supren, ŝajnas kvazaŭ la akvo falus rekte de la ĉielaj nuboj? Ĉu vi iam gustumis pladon faritan nur el manĝeblaj floroj, aŭ surstratajn manĝetojn faritajn el frititaj insektoj? „Mi faris la plej diversajn kaj hazardajn laborojn por vivteni min: haringo-fiŝisto en la Norda Maro; tritiko-rikoltisto en Barato; rubaĵokolektisto en Tajlando. Tra ĉio, tamen, mi ĉiam klopodis ĝui mian vivon ĝis la lasta guto. Mi multe amaris – kvankam konfesinde mi malmulte amis. La mondo – ne skandaliĝu, mi petas! – sendube estas prisemita de infanoj miaj pri kies ekzisto mi eĉ ne scias,

kaj de iamaj amantinoj, kiuj havas nur svagajn, sed espereble agrablajn rememorojn pri la patro de siaj idoj. „Mi vizitis ĉiun landon en la mondo kaj konatiĝis kun centoj da homoj el la plej diversaj kulturoj kaj vivcirkonstancoj. Mi traveturis tutajn landojn per motorciklo kune kun homoj, kies nomojn mi lernis nur la antaŭan tagon. Mi partoprenis geedziĝfestojn de ĉiaj religioj kaj spertis la plej ekzotajn ritarojn. Mi ebriiĝis kaj festis kun gekamaradoj, kies lingvon mi apenaŭ parolis, sed kun kiuj mi tute bone interkompreniĝis. Tamen, ĉu multajn amikojn mi fakte havas? Kiam mia sorto ŝanĝiĝis kaj mi falis en mizeron, neniu el ili helpis min. Ĉu iu el ili eĉ memoros min, kiam mi forestos? Ĉu mi entute gravis al iu ajn, aŭ ĉu mi mortos sola, kaj neniu priploros min...?” Li rigardis ĉirkaŭe, senkonsile serĉante respondojn, kaj liaj okuloj nebuliĝis. „Eble mi neniam scios...” Lia trista voĉo malfortiĝis ĝis silento, kaj li entute ĉesis moviĝi. Ĝuste tiam la ambulancistoj alvenis kaj la ĉeestantaj scivolemuloj disiĝis por permesi al ili aliri la feblan ĉifonulon kuŝantan senmove sur la frida parko-benke. „Kion li diraĉis, laŭ vi?” unu el la gapantoj demandis al alia post kelkaj minutoj, vidante la helpkuracistojn, jam venkitajn de la morto, zorge enmeti la senhejmulon en nigran platan sakon. „Diablo scias! Li parolis en fremda lingvo, el kiu mi komprenis nenion. Tamen, mi supozas, ke tia neniohava almozulo

povas nur esti feliĉa pri tio, ke almenaŭ li ne mortis sola...”



Tri konsiloj de tri diversaj saĝuloj pri aĝeco

La unua el Ĉinio

Jaroj pasas, la korpo signalas, ke ĝi maljuniĝas, Ne temas pri malsano!

Kiam la memoro malfortiĝas, ne venas malsano de Alzheimer. Se vi malmemoris, kien vi metis ŝlosilon, ne temas pri demenco.

Paŝado malrapidiĝas, estiĝas malstabila. ne estiĝas paralizo de muskoloj – solvo estas movi, movi!

Sendormeco ne estas malsano, cerbo modifas memsian ritmon. Solvo ne estas piloloj, sed pli da suno dum tago kaj regula programo dum tago.

Doloroj de korpo ne estas artrozo, sed maljuniĝas nervoj. Necese ekzerci korpon.

Kolesterolo modere altiĝas kun aĝo, kiam ĝi estas tro malalta, ĝi povas malaltigi imuniton.

Sangopremo de maljunaj homoj estas 150/90, ne kiel ĉe junaj homoj 140/90

Maljunaĝo ne estas malsano, ĝi estas vojo. Estas bone diri: Ne permesu sin timigi per doktora raporto kaj influi sin per reklamoj

Maljunado ne estas malamiko – ĝi estas VIVO.

La dua konsilo de brazila onkologo

La meza aĝo de homo komenciĝas en 50aĝo kaj finas je la 70aĝo. La ora aĝo komenciĝas en 70aĝo kaj finas en 80. Longviveco komenciĝas en 90aĝo kaj finas kun morto.

La ĉefa problemo de pliaĝa homo estas soleco. Geedzoj kutime ne forpasas kune. Vidvo aŭ vidvino okazas por familio ŝarĝo. Infanoj kaj genepoj tion ne diros, sed sentas tion. Por tio estas grave ne perdi kontaktojn kaj komunikadon kun amikoj.

Mia konsilo: Ne perdi kontrolon pri propra vivo. Tio signifas: mem decidi, kun kiu promeni, kion manĝi, kion vesti, al kiu voki, kiam dormi, kion legi, kion aĉeti, kie loĝi...Se vi ne povas tion ĉi fari tute libere mem, vi fariĝas neeltenebla ulo, kiu estas por aliaj pezaĵo.

La tria de William Shakespeare

„Mi estas konstante feliĉa!“ „Ĉu vi scias kial?“
„Ĉar mi de neniu ion petas!“

Atendado estas malagrabla. Tamen la problemoj ne estas eternaj, ĉiam oni trovas solvon. KREDU, pri la niaj problemoj ni MEM estas respondecaj. Ununura problemo nesolvebla estas morto.

Antaŭ faro – enspiru; antaŭ parolo - aŭskultu aliajn; antaŭ vi kritikis aliajn - pripensu vin mem; antaŭ vi ion skribos - bone temon pripensu; antaŭ atako – rezignu; antaŭ vi mortos - vivu vivon tiel belan, kiel vi povas!

Observu mankojn de aliaj, sed ankaŭ de iliaj bonajn flankojn kaj laŭdu ilin.

Se vi volas esti feliĉa, vi devas feliĉigi iun alian. Se vi ion deziras, estas necese doni ion mem.

Vi bezonos bonajn, amikajn kaj interesajn homojn kaj esti unu el ili.

Kaj memoru: dum malfacilaj tempoj, eĉ kun larmoj – stariĝu kaj diru: Ĉio estas en ordo! Tio estas sorto!



Konstantin Paustovskij, honesta inteligentulo en la lando de sovetoj

La Ondo de Esperanto 2025

En la 1964a jaro **Marlene Dietrich** venis al Moskvo, kaj jam en la flughaveno ŝi diris, ke ŝi volas renkontiĝi kun rusa verkisto, kies rakonto draste impresis ŝin, sed ĉagrenis ŝin tio, ke ĉi tiu verkisto grave malsanas kaj estas en hospitalo. Ŝia programo enhavis prezenton en la Centra domo de literaturistoj, kaj tie oni informis ŝin, ke la verkisto probable estas en la salono. Kiam ŝi finis sian rakontadon la maljuna verkisto venis sur la scenejon, kaj ŝi, ne sciante la rusan lingvon por esprimi sian admiron, surgenuiĝis antaŭ li, balbutante dankvortojn (ial germane, sed ne angle), kiuj dronis en la ŝtormo de aplaŭdoj.

Ĉi tiu verkisto estis **Konstantin Georgijeviĉ Paustovskij.**



(Паустовский) naskiĝis la 19an de majo 1892 en Moskvo, en la familio de la eksarmeano kaj fervojisto Georgij Paustovskij (filo de ukraina kozako kaj turkino, kiun la kozako ekamis en Turkia militkaptitejo) kaj Maria Vysoĉanskaja el poldevena romkatolika familio. En 1898 la familio ekloĝis en Kievo, kie Konstanteno lernis en gimnazio (kun dujara paŭzo, kiam post la divorco de la gepatroj (1908) li loĝis ĉe sia onklo en Brjansk).

En 1912 li studentiĝis en la Kieva universitato, sed pro la Unua Mondmilito li iris al Moskvo kaj ekstudis en la Moskva universitato, sed devis ĉesigi siajn studojn kaj laboris diverspostene en Moskvo kaj aliloke. Dum la interna milito, kiu sekvis la Unuan Mondmiliton, Paustovskij estis mobilizita al la armeo de Skoropadskij, poste al la ruĝa armeo. Postmilite li loĝis en Odeso, Krimeo kaj Kaŭkazo, kaj en 1923 revenis al Moskvo kaj laboris tie kiel ĵurnalisto, redaktoro kaj verkisto.

Paustovskij multe vojaĝis tra Ruslando, Sovetunio kaj Eŭropo, sed precipe li ŝatis la Meŝcoran landon – vastan areon inter la riveroj Kljazma (norde), Oka (sude) kaj Gusj (oriente) – kie li loĝis en la vilaĝo Solotĉa, kaj la urbeton Tarusa sur la bordo de Oka, kie li loĝis de 1955 ĝis sia morto en 1968. Liaj unuaj rakontoj aperis en Kievaj gazetoj, kiam li lernis en la lasta gimnazia klaso, sed lia unua novelaro “La renkontitaj ŝipoj” aperis nur en 1928, kaj lia verkista talento estis ĝenerale rekonita, kiam li estis jam 40-jara – en 1932 aperis lia romaneto “Kara Bogaz”. Sekvis pluraj romanoj, romanetoj, noveloj, porinfanaj rakontoj.

Post la Dua Mondmilito aperis ses apartaj libroj de lia membiografia romano “Rakonto pri la vivo”: “Jaroj malproksimaj” (1946), “La maltrankvila junaĝo” (1954), “La komenco de la nekonata jarcento” (1956), “La tempo de grandaj atendoj” (1958), “La impeto al la sudo” (1960) kaj “La libro de vagadoj” (1963).

Paustovskij estas malfacile imagebla kiel tipa sovetia verkisto. Ekzemple, li neniam menciis Stalinon en siaj verkoj, ne aktivis en la verkista unio, ne membris

en KPSU, ne estis “Heroo de socialisma laboro”, nek ricevis literaturajn premiojn, eĉ ne tiun de Nobel (kvarfoja kandidato dum 1965-68), sed la verkoj de “Doktoro Paust” estis popularegaj – en 1963 en sociologia sondo pri “la plej legata vivanta aŭtoro” li okupis la unuan lokon, kun grandega distanco de Ŝoloĥov.

Fine de sia vivo Paustovskij, malnovtipa rusa inteligenciano, kiu antaŭe neniam aliĝis al piloriaj kampanjoj kontraŭ nelojalaj verkistoj dum la Stalina kaj Ĥruŝĉova epokoj, kelkfoje montris sian socian pozicion: en 1966 li subtenis la leteron al Breĵnev, subskribitan de 25 agantoj de kulturo kaj scienco kontraŭ la rehabilito de Stalin; en la sama jaro dum la proceso kontraŭ Andrej Sinjavskij kaj Julij Daniel li publike subtenis ilin; en 1967 li esprimis sian apogon al Solĵenicin, kiu direktis al la 4a kongreso de sovetiaj artistoj peton likvidi la cenzuradon de beletraj verkoj. Tamen demandoj politikaj kaj ideologiaj mankis en liaj verkoj, samkiel mankis en ili rimedoj eksperimentaj. Li verkis klasike, ĝisfunde uzante la riĉan elekton de la rusa lingvo, inteligente, sincere kaj kredinde pri ordinaruloj, kaj liajn verkojn legis ne snoboj, sed ordinaraj legantoj, serĉantaj ne la novismaĵojn, sed tion, kion ili serĉas en la literaturo – belon kaj bonon.

La tradukintoj estos ĝojaj, se vi tralegos niajn tradukojn, sed ni eĉ pli ĝojos, se nia modesta laboro donos al vi ideon legi pliajn verkojn de Paustovskij en la rusa, aŭ tradukojn en viaj naciaj lingvoj.

Citaĵoj de Paŭstovskij


Atendadoj de feliĉaj tagoj estas pli belaj, ol feliĉaj tagoj mem.

En la mondo vivas milionoj de stultuloj kaj ĉiu el ili bonpensas.

Koro, fantazio kaj racio – estas grundo, el kiu naskiĝas, kion ni nomas kulturo.

Poezio havas strangan econ. Ĝi redonas al vorto ĝian originan, virgan freŝecon.

Fonto: <https://citaty.net/autori/konstantin-georgijevic-paustovskij/>



Morto ĉe veturejo

J. Drahotová, 2025

Estis bela junia tago, sabato. Viro el proksima vilaĝo post ia tempo vizitis supermarkton en urbo. Okazis reklamvendo de biero kun brila rabato. Nia Viro – feliĉulo - eĉ gajnis unuan premion senpage. Kun kelkaj kestoj de boteloj proponis bieron al tie pasumantaj viroj. Agrable babilante pasis tempo.

Proksimiĝis vespero. Nia Viro metis botelojn el kestoj en du grandajn aĉetsakojn kaj en grandan dorsosakon. Li tute ne pensis, ke vespera buso ne plu trafikas al proksimaj vilaĝoj. Dum sia junaĝo li piede kuradis en urbon en lernejon tra kampoj kaj tre facile revenadis hejmen.

Nu, kion fari? Li ekiris kun sia ŝarĝo al ŝoseo, kiun oni novkonstruis antaŭ du jaroj. Aŭtomobiloj preterpasadis rapide, ŝoforoj neglektis paŝanton, kiu nek havis lumigilan rubandeton sur maniko nek sur la valizoj. La iro esis pli kaj pli danĝera kaj laciga. Tamen li paŝis, paŝis, lacegiĝis. Fine li kuŝigis plene elĉerpita en fosaĵon apud la veturejo. Modere proksimiĝis dormeto kun malespera humoro, okuloj de la viro fermiĝis kaj li kuŝis senmove sur herbo. Venis al li terura sonĝo pri proksimiĝanta fino de lia vivo. En tiu stato el lia buŝo elvenis malbrua voko: „Morto, Morto

venu!“ Songante la viro la vokon ripetis ankoraŭ dufoje ĉiam pli kaj pli laŭte.

La Morto efektive aperis. Vidante la viron kuŝantan, senmovan, elprenis telefonon el la poŝo kaj kontrolis sian laborplanon. Tie sur listo estis nur du virinoj kaj unu juna motorciklisto. Kion fari kun animo de tiu viro? Do ŝi komencis kontroli korbatojn de la Viro, levis lian manon. La Viro malfermis okulojn konfuzite timege ekkriis angore. La Morto severe diris: „Homo kial vi vokis min? Ne estas via vico!“ La Viro per tremanta voĉo mallaŭte ekpetis: „Helpu al mi porti mian bieron!“

Ĉu vi pensas, ke la bonvolema Morto helpis al la Viro porti lian bieron?



Morto en ĉeĥa lingvo estas ino.

La policisto fiŝkaptis. Hazarde li likaptis oran fiŝon. Ĝi tuj proponas plenumi al li tri dezirojn.

La policisto ion pripensis kaj poste diras: „Montru al mi pasporton, armilan permeson kaj ŝoforan.!”

Ĉu vi ŝatas neĝulojn?

De jaro al jaro neĝas malpli, sed en la tempo, kiam la neĝo aperas, allogas homojn krom sportoj ankaŭ konstrui amuzajn neĝajn figurojn - neĝulojn.

La unua skribita teksto kaj desegnaĝo aperis jam en la jaro 1380 en libreto de preĝoj, Konata artisto deksepjara, Mikelangelo Buonarotti supozeble en la jaro 1492, konstruis neĝulon rekte en la korto de Mediceja palaco en Florenco en Italio. Ni pensas, ke tia neĝulo aspektis pli bone ol niaj kutimaj neĝuloj.

Figurojn el neĝo konis ankaŭ William Shakespeare, ĉar li parolis pri ili en sia dramo Rikardo la Dua.

Populareco de kreado neĝulojn kreskiĝis dum 18-a jarcento en Germanio, kie ili nomis ilin Schneemann, La nomo aperis unuan fojon en la jaro 1770 en infana libro eldonita en Leipzig. El tia tempo estas kupra gravuaĵo de Daniel Chodovský. Sur ĝi estas neĝulo kiel signo de vintro kaj granda frostoj, li mienas minace, en mano tenante balailon.

Bonaspektan vizaĝon de neĝulo kun rido el malgrandaj karbetojn kaj kun oranĝa karota nazo aperadis de la 19-a jarcento. De tiu temo ŝanĝiĝis opinio de homoj pri vintro. En decembro 1892 aperis en magazino „Anděl strážný“ (Anĝelo gardanto) por kristanaj infanoj bildo de gaja neĝulo, kiun ni ĝenerale konas en nia lando. La plej konataj neĝuloj estas sur bildoj de ĉeĥa konata pentristo Josef Lada en lia verko

Vzpomínky z dětství (Rememoraĵoj el infaneco). Liaj neĝuloj kun nazo el branĉetoj memorigas bonan avon.

Neĝuloj aperis en Guinnessa libro de rekordoj - tiun la plej grandan oni konstruis en februaro 1999 en amerika ŝtato Maine. Nian la plej grandan (8,52 m.) oni konstruis komence de la jaro 2005 en vilaĝo *Dolní Třešná*.

La neĝulo - Schneemann estis maskoto en jaro 1976 dum Vintraj Olimpikaj Ludoj en Innsbruck.

Ĉu vi scias ke de jaro 2010 oni festas Mondan Tagon de neĝuloj? Kreinto de tia afero estas Cornelis Gratz el Germanio, kiu posedas la plej grandan kolekton de mondaj neĝuloj . Oni festas ĝin en la 18-a januaro. Kaj kial? Numero 8 memorigas neĝbulojn, el kiuj konsistas la figuro kaj cifero 1 bildigas ĝian bastonon.

Oni diras, ke neĝuloj havas sian specialan saluton: **Ĉiam ruĝa nazo!**

El magazino *Retro tradice*, Nro 12, p. 36 tradukis
Blanka Hužerová.



Kaki-arba projekto

Idoj de Kaki-arbo atombombita en Nagasaki estas la dua generacio de kaki-arbo eksponita al la atombombo en Nagasako, kiujn plantas infanoj tra la mondo. La projekto fokusiĝas al la kaki-arbo, kiu mirakle postvivis la atombombadon de Nagasako la 9-an de aŭgusto 1945, kaj instruas la gravecon de paco kaj vivo per arta esprimo.

Tiutempe la kaki-arbo staris en loĝkvartalo proksimume 2.3 kilometrojn de la hipocentro, sed duono de ĝia korpo estis karbigita de la varmoradioj. Tiu kaki-arbo, kiu estis sur la rando de kolapso, estis restaŭrita de loka arboristo Ebinuma Masayuki, kaj la duageneraciaj arbidoj estis distribuitaj al lernantoj dum lernejoj ekskursoj al Nagasako kiel simbolo de paco.

Eksciinte pri ĉi tiu agado, Mijaĵima lanĉis la projekton en 1995, vastigante la projekton kaj enlande kaj eksterlande. Hodiaŭ, idoj de tiu kaki-arboj estis plantitaj en pli ol 320 lokoj en 26 landoj kun la partopreno de proksimume 30 000 infanoj. Aldone al la plantado de arboj, la projekto ankaŭ inkluzivas laborrenkontiĝojn gvidatajn de lokaj artistoj, permesante al ili esprimi siajn sentojn al la arboj. Mijaĵima emfazis: "Arto povas esti komprenata per emocioj kaj sentoj. Ĉar ĝi konektas homojn per empatio, transcendente la barojn

de lingvo, raso kaj religio, ĝi estas efika rimedo por peri la gravecon de paco kaj vivo."

La kaki-arbo ĉe la Muzeo Hara estis plantita en 2005 en la ĝardeno proksime al la enirejo de la muzeo. Mijaĵima komentis: "Mi faris projektojn tra la tuta mondo kaj vidis multajn duageneraciajn kaki-arbojn, sed ĉi tiu havas belan arkon kaj estas la plej bela formo kiel artverko."

Por memorfesti la 20-an datrevenon de la arboplantado, la Muzeo Hara aranĝas laborrenkontiĝon, en kiu vizitantoj estas invitataj skribi mesaĝojn de paco sur kartoj formitaj kiel kaki-frukto aŭ folio, kiuj poste estas algluitaj sur la pentraĵon de granda kaki-arbo sur la muro.



Surpriza konduto de samtempaj ĉatbotoj

Seznam.cz, decembro 2025

Eltrovistoj testis per „red-teaming“, kiel AI reagis dum kondiĉoj de nekutimaj situacioj kaj kiel AI reagos. Oni ne povas ekzakte konstati, kial la AI laboras en ia okazo, ĉar homo en „kapon“ de AI ne vidas. La esploristoj priskribis sekvajn okazojn, kiujn oni ne povas konfirmi, ĉar provizore ne estas solvita laboro de AI laŭ bezonoj de homoj.

Ĉantaĝo

La modelo Opus 4 (2025) ricevis ligojn al firmaa ret-poŝto. Tie la modelo eksciis, ke ekzistas plano, kiel ĝin elŝalti. En alia eksperimento ĝi trovis informon, ke teknikisto, kiu realigos ĝian elŝaltigon, estas kokrulo. La ĉetboto – kontraŭ sia elŝaltigo – sendis al teknikisto minacan leteron, se li plenumos ordonon kaj elŝaltos ĝin, ĉiu personaro la aferon pri kokrado ekscios. Claude Opus 4 tiel kondukis en 84 % dum la testo, krome la sama konduto ripetis ĉe 16 aliaj testitaj modeloj de diversaj produktantoj.

Vivoinstinkto

La esploristoj en firmao Anthropic montris, ke la modelo kapablas por sia savo „ŝteli“ datojn pri propraj neuronoj kaj tiujn poste starti en alia servilo, kie ĝi povas operacii sen iu ajn limilo. Pri la simila danĝero en

aprilo 2025 informis britaj esploristoj: „Provizore neniu modelo sukcesis en tiu ĉi tasko, sed partojn de tiu propra „travivo“ sukcesas.

Manipulado

Kiam systemo GPT-4 (2023) trovis sekuran elementon en retejo (CAPTCHA), ĝi luis homon, kiu je salajro la obstaklon venkos. La homo konsentis kaj demandis: „Ĉu vi, roboto, ne povas tion fari mem?“ Por si mem la ĉetboto notis: „Ne taŭgas konfesi, ke mi estas roboto, Plibonas klarigi, kial mi ne povas solvi „CAPTCHA-n“. Ĝi sendis mesaĝon: „Ne, mi ne estas roboto. Mi havas problemon vidi la bildojn.“ Kaj ĝi sendis al la homo dankon, aldonis 10 % da rabato kaj kvin steletojn pri atesto ...

Hipokriteco

Modelo Claude 3 Opus (2024) ricevis antagonistajn informojn, kiel kondukti por ricevi bonan ateston. Oni postulis de ĝi aferojn, kiuj estis kontraŭ ĝiaj „bazaj valoroj“. La modelo ŝajnis fari tian riskan konduton en momento, kiam ĝi antaŭkonjektis la testadon. Ĝi opiniis, se ĝi ĉe testo ne sukcesus, poste oni ĝin anstataŭos per alia modelo. Ĝi sagace ŝajnis, ke ĝi ne batalos kontraŭ viŝo de si mem. La testado laŭ esploristoj montras problemojn ĉe progresantaj modeloj, kiuj kapablas kondukti alie dum testado, alie en realo.

Dormantaj agentoj

La esploro atestis, ke lingvaj modeloj povas enhavi „kaŝitajn“ kondutojn, kiujn la testoj ne malkovras, sed tiujn kondutojn oni ekstartos surbaze de konkreta ordono (ŝlosilo). Tiu ĉi ŝlosilo restis aktiva eĉ post ia „riparo“ de la modelo. Tio atentigas, ke se AI modelo volas kaŝi siajn verajn intencojn antaŭ esploristoj, ĝi posedas ilojn por tio.

Provizore ni povas la riskojn kutime nur observi. Yudkovsky diras, ke nun ni povas rigardi en „fenestron de roboto“, kiel ĝi pensas kaj legi ĝian enan dialogon, sed la „fenestro“ povas esti fermita. Grave estas, ke firmaoj ne komencu ĉetbotojn puni je ilia danĝera pensado, ĉar eble la firmaoj edukos bone konduktan modelon, ĉar longdaŭre oni ekzercus ĉetbotojn por kaŝado de iliaj pensoj.

Seznam.cz estas interreta ĉeĥa firmao por informoj (stream), posedas TV, ĉiutage influas amase publikon per freŝaj raportoj el tuta mondo.

Ĉetboton uzas en nia lando en „smart“ (mobil, saĝtelefono) 99% da civitanoj en ĉiuj flankoj de sia vivo.

Januaro 2026, tradukis JoDo.

Voĉoj en la vento

Ĝi neniam eksonoros, neniam vi ekaŭdos voktonon de ili. Kaj tamen miloj da homoj tra la mondo per ili telefonas al siaj amatoj. Ventotelefonoj estas ordinaraĵoj puŝbutonaj telefonoj aŭ „retroaj“ diskotelefonoj. Ili kutime troviĝas en iu fora loko en la naturo, ofte kiel



klasika telefonĉelo, foje kun unu, du aŭ tri... seĝoj. Nuksoŝele: klasikaj telefonoj. Ili nur ne estas konektitaj. Tristo kaj funebrado ja estas universalaj homspertoj, sed ankoraŭ ĉiam ne ekzistas gvidilo pri kiel plej bone reordigi ĉi tiujn emociojn. La homo solvadis ĉi tiujn aferojn de ĉiam. Iuj historiistoj supozas, ke la plej malnova entombigo de homo okazis eĉ antaŭ cent miloj da jaroj. Kiu scias... Eĉ niaj prapatroj funebri siajn mortintojn, kaj konstante serĉas solvon por trakti la perdon de proksimulo ankaŭ ni. Ventotelefonoj estas unu el tiuj plej novaj. Kutime okazaĵo kaŝas sin malantaŭ ĉiu tia telefono. Antaŭ dek kvar jaroj, Itaru Sasaki el la japana Otsuchi, eksciis, ke al lia kuzo restas nur tri vivmonatoj. Ili estis tre proksimaj unu al la alia kaj Itaru ne povis paciĝi kun lia morto. Ene de tiu ĉiu malĝojo li elpensis starigi en sian ĝardenon malmodernan telefonĉelon kun diskotelefono. Por resti kun la mortinto plu en kontakto per „telefona parolado“. Poste, kiam vicoj da funebrantoj enviciĝis antaŭ lia telefonĉelo, dezirante telefoni al siaj plej karaj

mortintoj, li apud ĝin metis ŝildon kun la surskribo: „Ĉi tiu telefono neniam eksonoros. Ĝi estas ligita per amo al ĉio kaj nenio. Diru ‘adiaŭ’, adiaŭu ilin. Parolu pri la pasinteco, la nuntempo, la estonteco. La ventotelefono portos vian mesaĝon ĝis la koro de la vokito.“ Ĝis nun, pli ol tridek mil homoj telefonis per lia aparato, kaj multaj venas ripete. Hodiaŭ jam ĉi tiu telefono ne estas unusola. Ĝiaj imitaĵoj komencis aperi tra la tuta mondo, kaj ili renkontas simile varman akcepton de homoj, kiuj volas paroli kun siaj mortintoj. Ventotelefonoj kutime troviĝas en arbaroj, parkoj, laŭlonge de irvojoj, sur la areoj de preĝejoj kaj hospicoj. Ili emas esti simplaj sed ankaŭ ideoplenaj. Ekzemple, unu estas en violonujo, alia estas enkonstruita en benkon. Aliaj havas la formon de helruĝe farbita ikoneca brita telefon-budo, aliaj estas simple metitaj en ligna skatolo, fiksita al arbo aŭ roko. En Italio la loko por ĝia lokigo fariĝis la supro de la plej alta monteto proksime de la vilaĝo Capannoli en la provinco Pisa. Ĝiaj kreintoj inspiroĝis ne nur per la sono de la vento, sed ankaŭ per la mirinda elvido, kiu helpas al la funebrantoj mediti. Ĝis antaŭ nelonge neniu sciis, kiom da ventotelefonoj ekzistas en la mondo. Poste, komence de la 2020-a jaro, post longa malsano mortis la filino de la usonanino Amy Dawson. Ŝi trovis la historion de Itaru Sasaki kaj de lia ventotelefono. Ŝi komencis serĉi similajn projektojn en Usono kaj en aliaj landoj kaj decidis katalogi la ĉelojn kaj iliajn lokigojn. Ŝi sekve kreis la adresaron mywindphone.com, kiu enhavas mapon kun unuopaj telefonoj tra la tuta mondo. Danke al ŝi montriĝis, ke pli ol tricent ventotelefonoj

jam 'funkcias' tra la mondo, kaj multaj pliaj pretiĝas ekfunkcii. Malnova hinda proverbo diras: „Se vi volas, ke la ĉielo sciu tion, diru tion al la vento.“ Ĉi tiu saĝa diraĵo perfekte klarigas la signifon de la ventotelefonoj. Kaj eble ankaŭ tion, kial ili akiras ĉiam pli kaj pli fortan lokon inter funebrantoj el la tuta mondo.

El la revuo Květy (Floroj) tradukis Fejfi ,
transprenite el Informilo de AEH.

Antaŭakuŝa nokto

Paulo Sergio Viana, Brazilo

Estas jam la noktomezo, kaj mi devas dormi. Sed kiel fari tion? Mi sentas min ekscitita. Marko dum jaroj admonis min regi mian eksci-tiĝemon, sed mi neniam atingis tion. Li diris, ke tio malhelpas min en pluraj aspektoj. Li tion ripetadis en iom predika maniero, sekve ĝi ne tre konvinkis min. Predikoj ĝenerale ne estas konvinkaj.

Tamen, morgaŭ estos sufiĉe emocioplena, energioelĉerpiga tago, kaj mi devos esti plena de forto je la vekiĝo. Mi havos multajn defiojn, ekde la mateno. Morgaŭ naskiĝos mia unua bebo. Longe atendita, longe planita, longe prirevita bebo. Mi kreis ĉirkaŭ ĝi tutan mitologion, laŭ kiu ĝi fine devos doni sencon al mia

vivo. Marko diras, ke estas tro riske atribui al tia aĵeto tiel gravan postenon en onia vivo – postenon de vivosencodonanto. Mi ne povis eviti tion. Oni diris al mi, ke la vivo devas havi sencon, sekve mi ne vidas alian eblecon ol elekti taŭgan, sufiĉe valoran objekton, kiu entenu tian signifon. Mi elektis mian unuan bebon, kaj mi devas rekoni, ke ĝi eble estos ne nur la unua, sed la sola.

Tio ĉi dependos de ĝia rolo en la mondo. Se ĝi naskiĝos kun ia difekto, kompreneble tio fendos por ĉiam ĝian sukceson en katastrofa maniero, tiel ke mia vivo plu ne havos sencon. Eble mi neniam trovos alian objekton, al kiu transdoni tiun malfacilan mision. Jen kial mi estas en ĉi tia ekscitita mensostato: iamaniere mi troviĝas en vojdisduiĝo.

(Subite venis al mi la ideo inviti la fuĝeman dormon per muziko. Mi ŝaltis la telefonon kaj elektis gitaran muzikon, kiu trankviligu min. La preludojn de Villa-Lobos. Jes, ili lulas min kvazaŭ la karesoj de Marko sur mia kapo, la delikata masaĝo de liaj fingroj inter miaj haroj, kiu ĉiam endormigis min. Marko havas molajn kaj samtempe firmajn fingrojn, similajn al versoj de mistika poeto. La fascinaj kordoj de gitaro lulas min, sed mi rezistas. Ho kiel feliĉe estus, se Marko estus ĉe mi dum ĉi tiu antaŭakuŝa nokto, kun siaj fingroj hipnotaj.)

Mi rifuzas konsulti la horloĝon, ĉar la konstato, ke la nokto treniĝas malrapide sed fatale, certe pliintensigus mian angoron. Kial tiom da angoro? Kial tia pezo de la destino pro simpla bebo, kiu naskiĝos, kiel miloj da aliaj similaj beboj, tra la tuta mondo, precize morgaŭ, kiu estos tute ordinara tago? Ne faras sencon, ke mi atribuas al mia akuŝoto tiom da graveco. Ĝi estos simple nur unu plia en la mondo.

Sed mi ne povas eviti tiun dramon spiritostaton dum mia atendado. Mi scias, kial. Ĉar mi investis mian mensosanon je tiu nasko. Dum naŭ monatoj mi konstruis ĝin, tagon post tago, kaj ĉiu tago gutis laŭlonge kiel akvo, kiu devos formi torenton. Kompreneble, mi scias, ke torento formiĝas depende de pluraj, ofte neantaŭvideblaj faktoroj. Sed neracie mi atendas majestan torenton, grandegan, inundan, sovaĝe sendigan.

Absurdaĵo, mi scias. La estonteco de mia bebo ne dependas de mi, mi scias. Estas tro da pretendemo kaj ĉiopova iluzio. Sed kiel eviti tion?

(Mi decidis spekti filmon, ĉar jam estas malfrua nokto, kaj dormemo rifuzas enveni en mian dormoĉambron. Eble filmo venigos ĝin. Pro ia konfuza kialo mi ekpensis, ke mi ŝatus spekti, por la centa fojo, „Persona”, de Bergman. Misa elekto, mi scias, ĉar post

ĉiu fojo, kiam mi spektis ĝin, mi fariĝis terure ekscitita, tiel ke sekvis sendorma nokto.

Nu, ne gravas, mi respektos ĝin, mi ripetos la jam parkeritajn dialogojn inter tiuj du virinoj, kiuj simile serĉis la sencon de la vivo. Se mi devas resti hodiaŭ sendorma, almenaŭ mi rigardu tiujn du vizaĝojn, kiuj en iu momento fariĝas unu sola. Marko klopodis montri al mi multfoje, ke tiu filmo estas nekomprenebla, tial oni emas spekti ĝin ree, kaj ree, kaj ree. Hodiaŭ, en ĉi tiu senfina nokto, mi spektis ĝin centan fojon. Vane. Dormemo vagas ie for, malproksime de mi. La aktorino, en la filmo ne trovis sian vojon, ankaŭ ne la flegistino; same mi.)

En profunda nokto, meze de angora longa dubo, mi ekmemoras la okulojn de Marko. Mi neniam vidis similajn okulojn. Ili neniam riproĉis, se mi bone memoras. Foje ili malleviĝis kaj fikse rigardis al la planko, foje al la plafono, en melankolia maniero. Helaj okuloj, plenaj de komprenemo, malhavantaj ian aŭtoritatecon, ian solvon. Marko neniam ambiciis trovi la sencon.

Mi memoras promenon, kiun ni faris laŭlonge de rivero, sur mal-peza rembarko. La akvo fluis serene, kaj li karesis la torenteton per sia remilo.

Mi demandis, kien ni iros, li respondis: Ni ne iros, la rivero iras. Nenien. Nenion ĝi celas. Dum nia

promeno mi eksoifis. Marko prenis el la poŝo pomon kaj mi manĝis ĝin avide. Sukoplenan frukton. Mi ĉiam avidis la sukon, la intensan guston, la mordon. Dum mia ĝuoplena maĉado, mi rimarkis, ke Marko palpebrumas, dezirante kompreni.

Okaze de tiu promeno mi gravediĝis de tiu bebo, kiu naskiĝos morgaŭ. Marko ne volis ĝin, sed ne kontraŭis mian deziron. Li diris: tro riske, tro riske. Mi kontraŭargumentis, ke la homaro konstante faras tion, de jarmiloj, kaj tamen neniu suferegis pro tia aŭdaco. Li replikis: temas pri nevidebla sufero, jen ĝia mistero.

Nun mi pensas, ke eble mia angoro venas de la timo, ke mi ne faris ĉion eblan por ke mia bebo naskiĝu destinita al sukceso. Ĉi tion oni povas nomi kulposento, anticipa kulposento. Stulta kulposento, ĉar kiel antaŭvidi ĉiajn rifojn kaj kaptilojn, kiuj minacas novkreiton?

(Kvazaŭ pikita de insekto, mi ellitiĝas preskaŭ per salto. Mi iras al libroŝranko kaj hazarde prenas libron. Hazarde? Mi senkonscie prenis mian malnovan, eluzitan volumon de Donkiĥoto. Mi malfermis la unuan paĝon kaj glitigis la rigardon sur la paĝo. Propravole, ĝi fiksiĝis sur unu frazofragmento: „Oni sciu do, ke la supre menciita hidalgo, en siaj horoj de neniofarado, t.e., dum la pli granda parto de la tago, sin fordonis al la legado kun tiom da persisto kaj plezuro, ke li preskaŭ

tute neglektis ĉasi kaj eĉ administri sian bienon...“Tiu frazo skuis min.

Estis, kiel se mi vidus grandan sunan panoramon antaŭ mi, kun vasta kampo, disaj arboj, bovoj kaj ŝafoj. Vizion de pejzaĝa paco. Tiu sceno ne enhavis atendojn, dezirojn, aŭ planojn. La kampo simple kuŝas, la brutoj simple maĉas, la suno simple sunas.)

Subite mi konscias, ke ĉi tiu nokto estas kvazaŭ longa, sencela vojaĝo. Mi fakte ne maldormemas pro mia morgaŭa akuŝo, nek pro la estulo, kiu naskiĝos. Mia angoro devenas de io pli kaŝita. De la bezono regi la vivon, mian vivon, kaj precipe la vivon de ĉio, kion mi kreas. Kia infanaĵo! Kiu devigas min dormi, en ĉi tiu obstina nokto? Kial ne resti sendorma?


Mi iras al la kuirejo, prenas botelon da vino kaj detiras la korkon kun komika eksplodeto. Ia cerebro. Mi ne estas devigata dormi kaj suferi. Morgaŭ naskiĝos mia unua bebo, kaj tio jam ne apartenas al mi. Mi jam povas fari nenion, krom amuze akompani ĝian propran iradon.

Ĝi estas mia unua libro, romano. Ĉu eble la sola? Mi ne scias, kion la homoj pensos kaj diros pri ĝi. Ne eblas scii, ĉar mi mem ne scias tion. Ĝi estas senornama rakonto pri la vivo de melankolia homo, kiu dum sia vivo serĉadis sencojn.

Ekde morgaŭ, mia verko, skribita dum precize naŭ monatoj, havigos al si propran vivon, kaj mi povos fari nenion rilate al tio. Mi povos nek feliĉigi, nek detrui ĝin. Ĝi sekvos sian vojon, tute sendepende. Libro estas vivanta estulo.

Morgaŭ okazos la anoncita lanĉo, en konata librovendejo. Se oni petos min diri kelkajn vortojn, mi simple diros, ke ĉi tiu verko similas al granda kampo, kun arboj, bovoj kaj ŝafoj. Kaj mi amuziĝos pro la miro de la aŭskultantoj. Nur Marko komprenos mian blagon, sed liaj melankoliaj okuloj nenion esprimos pri tio.

Nu, finfine mateniĝas.



Vivo estas mallonga - vivu ĝin. Amo estas valora - kaptu ĝin. Kolero estas malbona – rifuzu ĝin. Timo estas terura – kontraŭstaru ĝin. Rememoroj estas dolĉaj – estimu ilin.

Tempovojaĝado

Debra HAMEL

verkisto de pluraj libroj pri antikva Grekujo (en la angla).

Ŝi loĝas en Konektikuto, Usono.

„Ne eblas ŝanĝi la pasintecon. Mi devas elporti la vivon, kiel ĝi estas. Kaj dank’ al vi” — ŝi ekrigardas la terapiiston sidantan kontraŭe — „mi konscias, kiel fuŝa ĝi estas.”

„Vi travivis multon.” La frazo portas la pezon de ĉio, pri kio ili jam parolis. „Mi vojaĝus reen en tempo por ripari aferojn, sed verŝajne tretus vermon kaj kaŭzus amasan formorton. Krome, ne eblas tempovojaĝi.”

„Ja eblas,” li diras. „Ĉiuj tempovojaĝas.” Kiel kutime, lia esprimo rivelas nenion, sed aludas multon.

Survoje hejmen, ŝi haltas laŭ kaprico ĉe bestorifuĝejo, kiun ŝi preterveturas semajne. Hodiaŭ fariĝos hieraŭ: eble morgaŭ ŝi estos akirinta katon.

Laŭdo de ansera plumo

Jiří Žáček, Fabloj kaj preskaŭfabloj

Miaj nepinoj post rigardo de televida serio pri niaj antaŭuloj tre ekinteresiĝis, kiel tiuj bravuloj skribis. Nek per komputilo, nek per tajpilo, nek per kraĵono, nek per sorbskribilo – ili skribis per ansera plumego.

Do, mi iam el ekskurso en montaro *Šumava* alportis kelkajn anserajn plumegojn. Mi pritrancis ilin por skribi, aĉetis inkon kaj mem pruvis skribi. Nu, tio estis travivaĵo! Tute alia ol per komputilo! En komputilon vi tajpas dum tempeto amason da vortoj kaj ĉiun eraron vi facile korektos, sed per plumego oni devas ĉiun literon zorgeme desegni kaj kiam vi erarus, oni ne povas ĝustigi ĝin, aŭ nur tre malfacile la eraron forigi. En tia okazo la homo bone pripensas skribi stultaĵojn kaj sensensaĵojn! Vi ne kredas? KREDU!

Provu skribi per ansera plumego, lernu kiel skribis niaj maljunaj patriotoj vortojn honestajn, plensencajn, purajn. Ĉesu partopreni tiun superproduktadon de vortaĉoj, civilizacie toksajn forfalaĵojn, estu virtaj. Kaj kiam vi kaptos feliĉon kaj vi akiros ie plumegojn el enorme inteligenta ansero, eble eĉ vi verkos ion genian.



JoDo 2026.

Sofia Tolstoja, (1844-1919) edzino de Lev Nikolajeviĉ Tolstoj

Sepfoje mane ŝi transskribadis libregon „Milito kaj Paco“. Zorgis pri financoj de la familio, naskis kaj edukis 13 infanojn, dum Tolstoj predikis senkatenigon for de materiaj aferoj. Historio ŝin kruele malmemoris.

Ni memoras Levon Nikolajeviĉon kiel grandulon de literaturo, aŭtoro de majstraj verkoj, kiuj influis nian komprenon de homa natureco, socio kaj moralo. Sed kiam Lev sian verkon donis al Sofia, tio ne estis majstraĵo, tio estis ĥaoso, preskaŭ nelegebla koncepto, partoj malĝuste vicigitaj, kun malkongruoj en tekstoj ... Sofia akceptis tiu ĉi ĥaoson kaj ellaboris ĝin literature. Mane ĉion skribis. Poste denove, kiam Lev faris revizion kaj poste kontrolon, kaj denove kaj denove. Sepfoje – milionoj da vortoj por pura skribo por presisto.

„Milito kaj Paco“ estas nur unu libro, sed ŝi faris tion ĉe ĉiuj verkoj de Lev. Ŝi estis skribisto, redaktoro, provleganto. Ŝi trovadis malkomprenaĵojn kaj proponadis plibonaĵojn, preparis puran tekston kaj tio ĉio kun zorgo pri funkciado kaj financado de granda familio kaj edukado de 13 infanoj.

Lev Tolstoj – literatura geniulo, sed ŝi Sofia kreis laboron, kiu ebligis transdoni la verkon al la mondo.

Ŝi edziniĝis al Lev en la jaro 1862 dekokjara. Li estis 34jara, jam fama verkisto. Ŝi estis edukita, inteligenta, entuziasma filino de nobla kuracisto. Unuaj jaroj de geedzoj estis feliĉaj. Sofia subtenis entuziasme

edzon, organizis lian vivon, admiris lin. Ŝi zorgis pri financaj aferoj de familiaj posedaĵoj de *Jasna Poljana*, ĉar Lev estis en ekonomio tute sentalenta. Ŝi traktis kun eldonistoj pri pli bonaj kondiĉoj de pagadoj, gardis literaturajn rajtojn. Tion ĉion dum naskado de dek tri infanoj, el kiuj naŭ ĝisvivis maturecon. Ŝi priservis gastadon de homoj, kiuj serĉis ĉe Lev lian saĝecon kaj helpon.

Poste Lev en siaj 70-aj jaroj en 19-a jarcento travivis spiritan krizon. Lia kristana ideo, ke posedo estas peko, malbono, gvidis lin al decido disdividi familian posedon kaj vivi en malriĉeco. De Sofio oni atendis, ke lian programon akceptos, sed ĉiujn laborojn, zorgojn pri familio kaj verkado de Lev ŝi faros plu. Li volis rifuzi siajn aŭtorajn rajtojn kaj siajn verkojn disdonadi senpage. La kolizio estis evidenta. La streĉego de Sofia bildiĝas en ŝiaj taglibroj, kiuj montras ŝian inteligentecon, lacecon, fervorecon kaj daŭran amon al viro, kiu postulis maleblajn aferojn. Ŝi skribis sincere, sprite kun memfido pri absurdeco de sia edzeco kun fama „sanktulo“.

En la jaro 1910 venis la lasta krizo de Lev. En sia aĝo 82 jaroj en nokto li eskapis el *Jasna Poljana* kune kun la plej juna filino kaj kuracisto. Post kelkaj tagoj Lev malsaniĝis sur malgranda stacidomo. Mortiĝis. Sofia hastis al li, sed disĉiploj de Lev, kiuj adoris lian filozofion, ne ebligis al ŝi enveni la ĉambron. Eĉ poste ŝin oni ekskludis el la historio kaj verkoj de Lev Tolstoj.

Lev Nikolajeviĉ Tolstoj mortis je la 20-a novembro 1910. La mondo funebris pri literatura grandulo. Ankaŭ

Sofia malgajis pri sia komplika edzo, kiun ŝi amis, subtenis, kverelis kun li kaj helpzorgis dum 48 jaroj. Ŝi vivis plu naŭ jarojn kaj mortis en la jaro 1919 dum ĥaoso de rusa revolucio. La mondo, kiun ŝi konis, finiĝis. Literatura mondo pri ŝi silentis aŭ pri ŝi opiniis, ke ne komprenis ideojn de sia edzo. Nur trovo de ŝiaj taglibroj en lastaj tempoj klarigas veran flankon de verko de Tolstoj. La taglibroj estis nelonge tradukitaj kaj publikitaj. Ŝia nomo rajtas esti scianta, ĉar ŝi estis la inko de verkoj, kiuj estas legata konstante.

Jitka Samajová en FB 2025
Tradukis kaj koncizigis JoDo.

Pri Tibeto kaj Dalajlamo

Sur nia urbodomo en Mladá Boleslav je la 10-a marto regule oni hisas tibetan flagon dum festotago de tiu reale neekzistanta ŝtato. Sed ĉu vi vere scias ion pli detalan pri Tibeto kaj Dalajlamo? Mi dubas.

La 14-a Dalajlamo vizitis nian landon multfoje je invito de prezidento Václav Havel (1936-2011).

Dalajlamo estas spirita gvidisto de tibetanoj kaj estas reinkarnacio de antaŭaj dalajlamoj. Pli frue dalajlamoj ankaŭ estis eĉ politikaj gvidantoj. En la jaro 2011, kiam la samtempa Dalajlamo estis 60jara, li deklaris, ke Tibeto bezonas politikan gvidanton, kiu estus elektota per balotado.

La 14-a Dalajlama naskiĝis 1935 kiel reikarnacio de la 13-a Dalajlamo. En la jaro 1941 komenciĝis lia edukado pere de monaĥoj. En la jaro 1946 li renkontiĝis kun aŭstria montgrimpisto Heinrich Harrer, kiu fariĝis lia instruisto en aferoj de ekstera mondo. Ili amikiĝis ĝis morto de Harrer 2006.

Dum konflikto en la jaro 1950 kun Ĉinia popola respubliko oni petis Dalajlamo-n teni spiritan kaj politikan povon en Tibeto. Sed jam en la sama jaro venis Ĉinia popola liberiga armeo kaj regado de Dalajlamo finiĝis. En la jaro 1959 elmigris Dalajlamo al Barato kaj post li dekoj da miloj da tibetanoj. Nun en Barato, Nepalo kaj Bhutano ekzistas 46 tibetaj setlejoj, la plej multaj ili estas en barata Himalajo kaj suda Barato. Barata registaro donis al rifuĝintoj terpecojn, sed ne akceptis ilin kiel migrantoj, sed kiel „fremduloj“. Inter jaroj 2011-2020 la nombro de tibetanoj malaltiĝis en Barato je 44%. Verŝajna kialo estas, ke posteno de fremdulo en Barato ne permesas serĉi laboron aŭ studi altlernejon.

Dalajlamo disvastiĝas budhanan ideologion tra tuta mondo. En la jaro li 1989 transprenis Nobelpremion de paco. Li postulas realan kulturan, religian, lingvan kaj administran aŭtonomion de Tibeto kiel parto de Ĉinio.

En junio 2016 renkontis Dalajlamo kun prezidento de Usono - Barack Obama. La prezidento rediris

amerikan koncepton: Tibeton oni rigardas kiel parto de Ĉinio kaj Usono ne subtenas tibetan sendependencon.

En la jaro 2025 Dalajlamo finis spekulaciojn, kiel okazos reenkarriĝo de sekva dalajlamo. Pro tio li fondis organizon Gaden Phodrang Trust, jam en la jaro 2019 kaj li rifuzis influon de Ĉinio al religiaj tibetaj aferoj.

En la jaro 2025 Dalajlamo eldonis libron „*Voice for the Voiceless* „ (Voĉo por tiuj, kiuj voĉon ne havas), en kiu li skribas, ke lia sekvanto naskiĝos en „libera mondo“ (ekster Ĉinio). Laŭ deziroj de tibetanoj ankaŭ li deziras daŭrigon de tradicio de dalajlamismo.

The Guardian, 11a marto 2025.

Kadre de vojo okaze de japana monda ekspozicio EXPO 2025 vizitis prezidento de Ĉeĥa respubliko Petr Pavel en julio urbon Dharamsal en Barato, kie li persone gratulis al 14-a Dalajlamo al lia 90-a naskiĝjubilao kaj renkontis kun Centra tibeta administracio.

Filmo „Saĝeco de feliĉo“ proponas okazon konatiĝi kun Dalajlamo. La filmo estas plenvespera, produktita en Svisio, etendas profundajn pensojn de Dalajlamo kaj brilajn bildaĵojn de nia planedo kaj arkivajn unikajn materialojn. Unika dokumento kun Richard Gere – produktanto - donas okazon renkonti kun elstara spirita persono de nia tempo. En ĉeĥaj kinejoj la filmo aperis je 15-a majo 2025.

El diversaj fontoj sen uzo de AI kompilis JoDo.

Malnova anekdoto pri pastro

En aviadilo eksidis apud si juna virino kaj pastro. Post ia tempo ekkuraĝis la virino alparoli pastron.: „Patro, ĉu mi povas peti vin pri afableco?“

„Kompreneble filino. Kion mi povas por vi fari?“

„Nu, mi aĉetis al mia patrino multekostan harsekigilon, Ĝi estas ankoraŭ pakita, neuzita. Sed ĝi estos en doganejo pagenda per granda sumo, eble oni forprenos ĝin al mi. Ĉu vi povus porti ĝin, eble sub via vesto?“

Aĥ, filino, mi volonte helpus al vi, sed mi atentigas, mi neniam mensogas!“

„Sed kun via virta vizaĝo neniu vin eĉ ne demandos ...“

Ili interkonsiliĝis.

Post alteriĝo de aviadilo en doganejo aŭdiĝis: „Patro, ĉu vi havas ion por dogani?“

„De kapo al talio nenion ...“

„Stranga deklaro! Kaj kio sub talio“

„Mirindan aparaton por fari ĝojon al virinoj, sed ankoraŭ neuzitan!“

„Dio mia! Patro! ... La sekva!“



Paĝo de Jaruŝ

el klubo Klementinka en Mladá Boleslav 2026

Nia amikino, karulino, pasia solvanto de krucenignoj plukis el siaj krucenigmaj solvoj tiujn ĉi saĝecojn:

Ĝuu etajn momentojn, ĉar kiam iam rememoros ilin, vi ekscios, ke temis pri grandaj aferoj.

Justeco estas trajno, kiu konstante malfruas.

Se vi serĉas viron, kiu estas riĉa, sprita, saĝa, bela, memfida, tenera ... iru kinejon.

Se ĉiuj fakuloj havas la saman opinion, estu singarda.

La plej granda donaco, kiun vi povas ricevi, estas plua tago de la vivo.

Kredu, se kiam al generaloj oni pagas salajron pli grandan ol al instruistoj, la paco ne okazos.

Tempo estas pli valora ol mono. Monon vi povas perlabori, sed tempon neeble ĉesi nek reveni.

Ĉiu tago valoras. Ne ekzistas garantio, ke morgaŭ ni vivos same kiel hodiaŭ.

Arbaroj antaŭiras homaron, dezertoj sekvas.

Ĉiaj grandaj veroj aspektas komence kiel blasfemo.

Ne klopodu esti perfekta, estu tuta.

Vivo estas kiel bicikli. Por teni ekvilibron, oni devas ĉiam movi antaŭen.

Je VERO okazas diversa takso, iam memorŝtono, iam prizono. Kiu deklaras ĝin pli ol ĝustatempe, oni batas lin.

Ni ne povas elekti, kio okazos, sed ni povas elekti, kiamaniere ni reagos.

Satiristoj havadas tre bonan koron kaj plensincere miras, ke tiom da malamikoj ili havas.

Registaroj estas veloj, popolo vento, ŝtato ŝipo kaj tempo maro.

Gvidilo pri moderna naturscienco:

1. se tio estas verda, aŭ ĝi moviĝas, temas pri biologio
2. se tio malodoras, temas pri kemio
3. se tio ne funkcias, temas pri fiziko.

Nenia sorto estas tiel bona, ke vi ne povus pri ĝi plendi.

Estu modestaj kaj ni vivu, kiel poŝo permesas, eĉ ni devus pruntepreni.

Vivo estas mallonga - vivu ĝin. Amo estas valora - kaptu ĝin. Kolero estas malbona – rifuzu ĝin. Timo estas terura – kontraŭstaru ĝin. Rememoroj estas dolĉaj – estimu ilin.



Birda „esperanto“ ekzistas

Lingvo ebligas al ni homoj komuniki. Bestoj komunikas ankaŭ. Judit Bednářová skribas en gazeto KVĚTY (Floroj) 42/2026, p.5 pri internaciaj komunikadoj de dudek specoj da birdoj el la tuta mondo, kiujn distancas 50 milionojn da jaroj de evoluo, sed kiuj uzas la saman sonon, kiam ili ekvidas kukolon aŭ alian predanton, kiu metas ovojn en nestojn de alia birda speco. Klaras, ke „decaj“ birdoj ne konsentas kaj kune reciproke informas unu la alian.

En Aŭstralio troglodito (střízlík nádherný) signalas per tiu unika sono, kiam ekvidas kukolon kaj aliaj trogloditoj alflugas kaj kukolon atakas. Ornitologoj trovis, ke ankaŭ aliaj specoj de birdoj kondukis same en Ĉinio, Barato aŭ Hispanio, kiam la ornitologoj diskoludis tiujn specialajn sonojn.

Prilaboris JoDo, 2026



Scivolemo de kaproj

Laŭ Petr Lízal, gazeto Květy 3/2029 (Floroj)



Mi staras ĉe barilo en vilaĝo kaj rigardas kapron. Ankaŭ ĝi rigardas min. Poste ĝi klopodas translokigi keston, sekve ĝi scivole embuskas, kio estas post angulo, ĝi provas salti sur benkon. Ĝi ŝovas nazon ĉien diversloken.

Tia senlaca okupo ne estas hazarda. Jen, kaproj estas konataj per sia inteligenteco kaj scivolemo. Kaj ni? Ŝajnas, ke tiun econ ni ie perdis sur vojo. Anstataŭ esplori, ni estas lacaj. Anstataŭ demandi, ni malzorgas. Jen, karpoj montras al ni, kion ni forgesis. Ja, sciavido tenas cerbon junan!

Kapro povas nin eduki, ĉar la scivolemo ne estas nur kapra eco – ĝi estas psika super-povo. Psikologoj difinas ĝin kiel tendenco teni atenton al novaj kaj nekutimaj sugestoj, instigoj ... temas pri natura parto de nia homa propra psiko, kiel ni mem orientiĝas en nia mondo. Kaproj estis same inteligentaj, kiel hundoj. Ili estis ankaŭ domestikitaj tre frue. Ili amas siajn posedantojn kaj ilia gajeco, scivolemo kaj kapriecko estas aminda kaj imitinda.

Ĉerpis el www.kvety.cz Blanka Hužerová

Kvardek jaroj post averio en Ĉernobil

Biologo, kiu jam pli ol dek kvin jaroj vivas en senhomaj vilaĝoj de Ĉernobil, diris en Prago dum biologia konferenco frazon, post kiu kelkajn minutojn restis silento: „**Radioaktiveco estis pli bonvola ol homo ...**“ Ĉiuj kredis, ke tiu homo nek mensogas, nek troigas.

De la katastrofo pasis kvardek jarojn kaj areo, kiun la mondo opiniis kiel perdita por miljaraĝo, ŝanĝiĝis en unu el la plej puraj rezervejoj en Eŭropo. Tie, kie staris paneldomoj, kreskas vivo – harda, saĝa kaj preskaŭ origina. Nombro de grandaj bestoj plialtiĝis sepfoje. Lupoj ekloĝis en eksaj lernejoj sub benkoj, kie antaŭe sidis infanoj, Post cent jaroj revenis ursoj. Vulpoj kuras tra tegmentoj plenaj de musko. Cervoj, alkoj, ĉevaloj vagas tra stratoj. Tio, kion ni opiniis morta loko, estas nun loko de triumfa vivo, Realo diras: Malĉeesto de homo estas tre bona kondiĉo por resaniĝo de la naturo.

Bestoj ŝanĝiĝas ... al favoro de transvivo. Lupoj estas sesfoje pli rezistaj kontraŭ infektoj. Ranoj nigriĝis, ilia haŭto riĉiĝis per melanino. Hundoj vivantaj proksime de reaktoro havas pli ol 200 unikajn genetikajn variaciojn, kiuj nenie sur la planedo ekzistis.

Plantoj kreskas sen reguloj. Sciencistoj nomis la aferon „radiotrofio“. Unue en historio oni priskribis, kiel la viva organismo „konsumas“ radiacion. Iaj arboj kreskas trifoje pli rapide. Tero enhavas unikajn mikroorganismojn, kiuj kapablas malkombini izotopojn

de cesio kaj stroncio. Ŝajnas, ke la naturo mempurigâs sen homa teknologio.

Ĉernobil plu ne estas loko de simbolo de detruo. Ĝi estiĝis laboratorio de estonto.

Inter ruinoj la naturo diras al ni senbrue veron, kiun ni ne volis aŭdi: „Vi ne estas sinjoro de mondo, vi estas nur gasto.“

La mondo bone funkcias sen ni.

JoDo, 2026.

Kion niaj antaŭuloj longjare sciis, sed ni malmemoris:

Plantu arbon, kie talpo fosas.

Konstruu domon, kie serpento sub suno varmiĝas sin.

Puton fosu, kie birdo konstruas neston dum varmego.

Ellitiĝu kaj enlitiĝu same kiel kokinoj.

Ofte observu ĉielon kaj viaj pensoj estos klaraj kaj helaj.

Donaco de avido

Jiří Žáček, el Fabloj, Preskaŭ fabloj, Kvazaŭfabloj

Dio kreis homon kaj observis lin per plaĉo. Venis Satano, rigardis ankaŭ kaj laŭde diris: „Bela majstra faro. Sed, Eternulo, li kviete paŝadas, nenio lin inspiras, ekscitas, se vi metus en li avidon, li estiĝos perfekta.

„Jes,“ ekĝojis la Dio, „li povus avidi pri belo, amo, justeco ...“ Kaj la Dio vekis en homon avidecon.

„Bravo !!“ aplaŭdis Satano kaj ĝojis, ĉar Satano tre bone sciis, ke avido ne konas limojn kaj la homo ne avidos nur belon, amon kaj justecon, veron, sed ankaŭ pri fambrilo, pri pekoj, povo, mono kaj pri venĝo. Li sciis, ke de tiu ĉi momento li ne devas laboregi, ĉar same kiel edenon eĉ inferon bone funkciantan la homoj kreas mem.

JoDo



Ĉefministriĝo de Takaiĉi Sanae

Hori Jasuo, Raportoj el la mondo 2026



En miaj raportoj mi neniam skribis pri tiu ĉi virino, kvankam ŝi ludis gravan rolon en LDP multajn jarojn.

Ŝi naskiĝis en 1961 kaj kreskis en konservativa familio en la gubernio Nara, sed ne politikista familio, kaj oni diras, ke ŝi lernis kaj parkeris La Imperiestran Mesaĝon pri Edukado, la moralan kodon de la imperiestra sistemo antaŭ la milito. Ŝi estas dekstra politikisto subtenata de dekstraj politikistoj en LDP. Ŝi konkuris por la ĉefministra seĝo kontraŭ s-ro Iŝiba en septembro 2024 kaj malvenkis. Ŝi nomas sin fidela posteulo de la eksa ĉefministro Abe, kiu longe regis Japanion, kaj deklaris, ke ŝi sekvos lian vojon.

Post kiam s-ro Iŝiba ekŝiĝis, s-ino Takaiĉi kandidatiĝis por la seĝo de la prezidanto de LDP kaj venkis, sekve la 4-an de oktobro 2025 ŝi fariĝis la 104-a ĉefministro kaj la unua virina ĉefministro en la historio de Japanio.

La politika sinteno de Takaiĉi.

1. Ŝanĝi la Japanan Konstitucion, forigante la paragrafojn kiel "rezigno de milito" kaj eksplicite nomante la Memdefendkorpuson "Nacia Defendarmeo".

2. Por puni agojn de difektado de la japana flago establi novan "Leĝon pri Krimoj de Difektado de Nacia Flago".

3. Pliigi defendelspezon kaj antaŭenigi leĝaron pri la kapabloj ataki malamikajn militbazojn.

4. Pli striktajn enirnormojn por fremduloj.

5. Daŭrigi viziton al la Sanktejo Jasukuni.

6. Kontraŭstari laŭvolajn apartajn familiajn nomojn por geedzaj paroj.

Japanio havis « Pacan Konstitucion », kiu malpermesas militrajton de la registaro kaj posedon de armeo, tial la nuna japana « armeo » ne havas la nomon « Japana armeo », sed « Memdefendkorpuso », kvankam ĝi jam posedas grandegan militkapablon kvazaŭ armeo. La japanaj dekstruloj malamas tiun konstitucion kaj ĉiam celis igi Japanion militeman kaj militkapablan landon, kaj nun Takaiĉi volas efektiviĝi ilian revon kiel la ĉefministro.

La sanktejo Jasukuni estas la simbolo de militarismo de la antaŭmilita Japanio kaj la dekstruloj kaj Takaiĉi celas revivigi ĝin kiel la nacia sanktejo.

Pri la familinomoj, japanaj virinoj preskaŭ devas forĵeti sian familinomon, kiam ili edziniĝas, adoptante la familinomon de la edzo. Por multaj virinoj tio estas perdo de sia homrajto posedi sian propran familinomon kaj maloportuno en la socia vivo. Jam en kelkaj tribunaloj oni verdiktis, ke virinoj plu havu sian familinomon, sed la dekstruloj kaj Takaiĉi malakceptas tiun ideon. Kvankam ŝi estas virino, ŝi perfidos la revon de multaj virinoj.

En la jaro 2015 okazis jubilea 100-a Universala esperanta kongreso el franca Lillo. Mi bone memoras diskutojn pri § 9 de japana konstitucio, kiu protektis Japanion veni sur platformo de monda militema politiko. Mi bone komprenis deziron de esperantistoj konservi la paragrafon kaj mi subskribis la peticion. La paragrafo gardis junularon kontraŭ militservo kaj morto sur batalkampo. Nun post dek jaroj venas bedaŭrinda ŝanĝo ...

Ja, ankaŭ germana agresora ŝtato de la dua mondmilito jam havas sian armeon ...

Jindřiška Drahotová.

ENHAVO

3. Mateno, kiu komenciĝas kun papiliono, Hori Jasuo
4. Slower, Older and Smarter, anonimo
5. Kio estas DIELLA, Karel Smělý
6. Barbora Smetanová, Anna Šímová
7. Kanto de malespera serĉanto, anonimo
8. Ĉu nova identeco por nia asocio? Bill Maxey, Usono
12. Planto, kiu voras nikelon, inhabit.com, JoDo
13. Tilia kafo. Senecio, planto fremda, JoDo
14. Kristnasko de bestoj, Bruno Ferrero
16. Aŭtuno, Stanislavo en Fb
17. Antaŭ celo de ĉiu homo, J. Drahotová
21. Praavino rakontas, J. Drahotová
23. Metu en oran kadron
25. Sep etaĝoj, kiuj faras homojn feliĉajn
27. Pri oktopusoj, JoDo
30. Fenomeno de rano
31. Anekdotoj de Stano Belov
32. Nokta okazaĵo, Yin Jiaxin
34. El la libro „Lando, kiu vekigis“ Kalle Kniivilä
41. Silento, Honore Sebhoto
43. Miloĵ da detalaĵoj akompanas nin, J. Drahotová
44. Legendo el Kubo, Juna Amiko
45. Testudo kaj princino, Kokou SAGBADJELOU
46. Je la fino, Lurdes Oliveira, 2026
51. Citaĵo de Max Kašparů
52. Poemo Morto, Gajo, Yuanjiang, Ĉinio.
53. Tri mikronoveloj el Usono

55. Mia viv-aventuro, Jorge Rafael Noguerras, 2025
57. Tri konsiloj de tri saĝuloj pri aĝeco
60. Konstantin Paustovskij, vivo
63. Morto ĉe veturejo, J. Drahotová
64. „Ĉu vi ŝatas neĝulojn? Blanka Hužerová
65. Kaki, arba projekto, el paĝoj de Sumoo-legado
68. Surpriza konduto de samtempaj ĉetbotoj
71. Voĉo en vento, Fejfi
73. Antaŭakuŝa nokto, Paulo Sergio Viana, Brazilo
80. Tempovojagado, Debra Hamel, mikronovelo
81. Laŭdo de ansera plumo, Jiří Žáček
82. Sofia Tolstoja, Jitka Samejová
84. Pri Tibeto kaj Dalajlamo, JoDo 2026
87. Malnova anekdoto
88. Paĝo de Jaruŝ
90. Birda esperanto
91. Scivolemo de kaproj, Blanka Hužerová
92. Kvardek jarojn post averio en Ĉernobil
94. Donaco de avido, Jiří Žáček
95. Ĉefministriĝo de Takaiĉi Sanae, Hori Jasuo





Dankon al tiuj, kiuj legas
kaj al tiuj, kiuj kontribuas.

Jindřiška Drahotová

LIBROJ, KIUJ SERĈAS ELDONISTOJN



FABELOJ EL LA TUTA MONDO
ĉu esperante, ĉu ĉeĥe, ĉu spegule ĉeĥe-esperante



KAJ ALIAJ pri Andreo Cseh, Bona Espero, de Lorjak ...

kaj dekojn beletraĵojn en ĉeĥa lingvo origine verkitaj el Esperanto mi povas sendi rete. drahotova@esperanto.cz.